


Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA



Budhismo
revigliĝas

Kotizoj de MONATO kaj LA JARO 1994*

Kiom?

		MONATO		LA JARO	
		surf.	aere	surf.	aere
Aŭstralio	AUD	52	61,5	8,6	12
Aŭstrio	ATS	450	515	63	87
Belgio	BEF	1250	1450	180	250
Britio	GBP	25	29	3,6	5,0
Danio	DKK	250	288	35	49
Finnlando	FIM	218	253	32	44
Francio	FRF	210	245	30	42
Germanio (ok.)	DEM	64	74	9	12,5
Germanio (or.)	DEM	48	58	7,5	11
Greko	GRD	5500	6860	1020	1500
Hispanio	ESP	3840	4600	680	950
Irlando	IEP	22	26	3,5	4,8
Islando	BEF	1000	1200	180	250
Israelo	NLG	55	66	10	14
Italio	ITL	56000	65000	8000	11200
Japanio	JPY	5900	6760	775	1075
Kanado	CAD	49	57	7,5	10,3
Luksemburgo	LUF	1250	1450	180	250
Nederlando	NLG	69	80	10	14
Norvegio	NOK	259	301	38	53
Nov-Zelando	NZD	66	79	11	15
Portugalia	PTE	4900	5880	880	1220
Sud-Afriko	BEF	980	1180	180	250
Svedio	SEK	290	337	44	61
Svislando	CHF	59	68	8	11
Tajvano	BEF	1100	1300	180	250
Usono	USD	42	49	6,25	8,75

Aliaj landoj: **Petu la tarifon de la landa peranto, aŭ, se tiu ne ekzistas, de la eldonejo: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. Telefono +32 32 34 34 00; telekopiilo +32 32 33 54 33. Noto: Se vi pagas kotizon por persono en alia lando, validas la tarifo de via lando, ne tiu de la lando de la abonoto.**

* Kotizoj validaj por pagoj kiuj atingas la eldonejon antaŭ la 31a de decembro 1993.

Al kiu?

Pagu al la landa kotizperanto...

Argentina: F-ino Marta Solis, Tucumán 50, RA-2600 Venado Tuerto (Santa Fé).
Aŭstralio: Libroservo de AEA, Post Office Box 230, Matraville, N.S.W. 2036. Tel. (02) 311 2246.
Aŭstria: Aŭstria Esperanto-Movado, Margarethengürtel 100, 1050 Wien. Banko: Die Erste, konto 000-99511.
Belga: Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43).
Brazila: Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084 Brasilia.
Brita: Esperanto-Asocio de Britio, 140 Holland Park Avenue, London W11 4UF (pĉk. 54 851 0008).
Bulgara: Press Esperanto, str. Ĵeko Dimitrov 80, BG-1303 Sofia.
Dana: Astrid Birkbak, Rugvenget 46, DK-2750 Ballerup (pĉk. 1705121 Girokontoret Høje Taastrup).
Finna: Oy Mendoservo Ak, Kivistöntie, SF-05510 Hyvinkää, pĉk.427 72-2.
Francaj: Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75000 Paris

(pĉk.: 855-35 D Paris).

• Esperanto-Klubo de Metz, 36 rue St. Marcel, 57000 Metz.

Germanaj: Hilde Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg (pĉk.: Nürnberg 650 92-858 (BLZ 760 100 85)).

• Esperanto-Centro Paderborn, Postf. 1450, 33044 Paderborn (pĉk.: Hannover 259658-301).

• Libera Esperanto-Asocio, Am Stadtpfad 11, D-65760 Eschborn (pĉk.: Karlsruhe 2125 01-759).

• Literatura-Servo „Espero”, Rolf Beau, Jacobstr. 9, D-04105 Leipzig (Deutsche Bank Leipzig konton-ro: 1195106 (BLZ 86070000)).

Greka: Helena Esperanto-Asocio, Agiu Meletiu 54, 11252 Ateno.

Hispanaj: Juan Azcuénaga Vierna, General Dávila, 127, portal 7, 2° izda., Santander (pĉk.: 03548531).

Hungara: Libroservo KFT, Pf 54, H-1426 Budapest.

Irlanda: Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12.

Islanda: Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavik.

Israela: Natan Heller, 77 Kazenelson str., IL-53270 Givatajim (konto: Bank Leumi 081810/01).

Itala: Itala Esperanto-Federacio, Via Villorosi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204).

Japanaj: KLEG, Sonehigasi 1-11-46-204, Toyonaka-si, Osaka-hu 561.

• Japana Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162.

Kataluna: Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions, Agència 461, konto 550/53).

Kanada: Kanada Esperanto-Asocio, P.O. Box 2159, Sidney, B.C., V8L 3S6.

Korea: Korea Esperanto-Asocio, C.P.O. kesto 4258, Seoul-100.

Kroata: Kroata Esperantista Unuiĝo, Trg Burze 2, HR-41000 Zagreb.

Luksemburga: LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: Luksemburgo 8936-12).

Nederlanda: Esperanto-Centrum Nederland, Riouwstraat 172, 2585 HW 's Gravenhage (pĉk.: 3583975).

Norvega: Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5.

Nov-Zelanda: Gwenda Sutton, 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1. Telefono kaj telekopiilo: (4) 473-0847.

Portugala: Portugala Esperanto-Asocio, R. Dr. João Couto, 6, R/C.-A, P-1500 Lisboa.

Pola: P.W.H. Nepo, ul. Broniewskiego 77 m. 137, PL-01-865 Warszawa.

Sud-Afrika: Colin Beckford, P.O. Box 1227, Cape Town-8000.

Svedaj: Esperanto-Skolan, Barnhusgatan 8, 11223 Stockholm.

• Sveda Esperanto-Federacio, Södra Rörum pl 455, S-24294 Hörby.

Svisa: Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel.

Tajvana: Tajvana Esperantista Asocio, P.O. Wang Chung-yi, No 13, 2 Alley 40 Lane Chung Yung St. Shih Lin, Taipei.

Usona: ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530.

Venezuela: J.E. Bachrich, Apartado 70782, 1071A Caracas.

aŭ pagu rekte al la eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

- Se en via lando ekzistas poŝtĉekonta sistemo, vi povas pagi al poŝtĉekkonto n-ro 000-0265338-43 (poŝtĉek-oficejo Bruselo, Belgio), de Flandra Esperanto-Ligo;

- Se en via lando ekzistas Euroĉekoj, vi povas sendi tian ĉekon. La valuto devas esti la belga franko (BEF) kaj dorso de la ĉeko devas troviĝi via bankkartnumero;

- Posedantoj de VISA-, MASTERCARD-, EUROCARD- aŭ ACCESS-kreditkarto simple sciigu per subskribita karto sian numeron kaj validodaton;



- Se vi havas konton ĉe UEA, sendu ĝirilon. La kontkodo de Flandra Esperanto-Ligo estas fela-x;

- Se vi havas konton en usona banko, sendu al ni ordinaran usonan bankĉekon. En tiu kazo la valuto devas esti la usona dolaro (USD).

Nur se vi ne povas pagi laŭ unu el la kvin supraj vojoj, uzu la jenajn, kiuj tamen kostos al vi multe pli:

- Sendu al ni ordinaran bankĉekon el via lando, prefere en belga valuto. Aldonu al la sumo 225 BEF aŭ ties egalvaloron plus la sumon kiun fakturos via banko. Bv. informiĝi tie. Sur la ĉeko vi skribu la nomon Flandra Esperanto-Ligo.

- Sendu al ni internaciajn respondkuponojn. Ili validas, se ili estas nur maldekstre stampitaj. Unu respondkupono egalas al 28 BEF.

Anonc-tarifo

	Grandeco mezuroj mm	prezo BEF
1/1	251 x 172	9900
3/4	188 x 172	7500
2/3	251 x 112	6700
1/2	dukolumna 188 x 112	5000
	trikolumna 124 x 172	
1/3	unukolumna 251 x 54	3400
	dukolumna 124 x 112	
1/4	unukolumna 188 x 54	2800
	trikolumna 59 x 172	
1/6	unukolumna 124 x 54	2000
	dukolumna 59 x 112	
1/12	unukolumna 59 x 54	1200

Aliaj formatoj: 50 BEF/cm²

Koloroj: Por aldono de koloro, pluspago de 3000 BEF.

Anoncetoj: 56 mm larĝa, 1 linio 40 BEF (minimume 6 linioj; ne eblas uzi fotojn, desegnaĵojn, emblemojn, kolorojn).

Suplementoj: Por aliaj paĝoj ol paĝo 2 10 % pluspago (rabatebla). Pri apartaj reklamfolioj por kunsendado aŭ alvinktado kontaktu la eldonejon. Por loĝantoj el la Eŭropa Komunumo aldoniĝos la aldonvalora imposto (AVI) de 19,5 %.

Rabatoj: Ĉe ripeto de la sama anonco dum du sinsekvaj numeroj 5 %, ĉe 3- ĝis 5foja aperado dum sama jaro 10 %, ĉe pli ol 5foja aperado dum sama jaro 20 %; 5foja ripeto de sama anonceto: -40 %.

Monato

internacia magazino sendependa
por politiko, ekonomio kaj kulturo

monata revuo en la internacia lingvo Esperanto legantoj en 75 landoj fondinto: Stefan Maul 14a jarkolekto aperas principe la 1an de ĉiu monato abontarifo varias laŭlande; petu ĝin de la eldonejo ■ **eldonejo:** Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono +32 3 234 34 00, telekopiilo: +32 3 233 54 33, elektronika poŝto: 100272.1601@compuserve.com; ĝirkonto 000-0265338-43 nome de Vlaamse Esperantobond, Antwerpen valida anonctarifo: n-ro 6 kompostita kaj presita en la eldonejo por adresŝanĝoj nepre menciu la kodon kiu troviĝas dekstre sur la adresslipo ■ **redaktoroj:** William Auld, Gerrit Berveling, Tim Carr, Mark Fettes, Marco Gazzetta, Evgeni Georgiev, Paul Gubbins, Girvan MacKay, Stefan Maul, Seán Osborne, Paul Peeraerts, Roland Rotsaert, Krys Ungar, Guido van Damme, Jean-Pierre Vandendaele 150 konstantaj korespondantoj en 45 landoj ■ aperas nur originale en Esperanto verkitaĵoj (ne tradukoj) represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto kopi-raĵto ĉe la eldonejo ne sendu registritajn leterojn ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj; mendu ĝin pagante 20 NLG al UEA, konto NORA-F *verantw. uitgever:* Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen MONATO ne nepre reprezentas la opinion de l' eldonejo.



Enhavo

Noticoj	4
El mia vidpunkto	5
Leteroj	6
Politiko	8
Moderna vivo	11
Medio	14
Scienco	15
Ekonomio	18
Turismo	19
Lingvo	20
Libroj	23
Novelo	24
Poezio	25
Eseo	26
Muziko	28
Spirita vivo	29
Humuro	30

En la momento, kiam tiuj ĉi linioj estas verkataj, en la nordo de Antverpeno, nur kelkajn kilometrojn for de la oficejo de Flandra Esperanto-Ligo, malfermiĝas Metropolis. Laŭ la reklambroŝuroj la plej granda kinejaro de l' mondo. En 22 salonoj – ĉiuj en unu granda konstruaĵo – pli ol 8000 homoj samtempe spektas la lastajn produktojn de la – ĉefe usona – filmindustrio. Dume kvino da bluaj laseraj lumfaskoj traboras la stelplenan ĉielon kaj kreas iun fascinantan noktan baledon. Supozeble ekzistas eĉ ne unu antverpenano, kiu ne scias kio ĉi-vespere okazas en sia urbo. La homoj de l' flandraj reklamkompanioj subridas kontente...

Ene de Metropolis la filmŝatantoj kubutumas por akiri bonan sidlokon. En kvar el la 22 salonoj oni montras la saman filmon, ĉar prezentado en nur unu kaŭzus tro longajn vicojn. Jurassic Park (Jurasa Parko) estas filmo, kiun oni – laŭ reklambroŝuroj – nepre spektu. Kaj la popolo, ĝi volonte obeas. La homoj de l' usonaj reklamkompanioj subridas kontente...

Ĉu vere ĉeesti filmspektaklon en salono kiu troviĝas en mastodonte grandega konstruaĵo estas tiom multe pli interese ol en malgranda kinejo en kvieta urbostrato? Ĉu vere la dinosaŭroj de Steven Spielberg estas tiom multe pli interesaj ol la ĉefrolantoj en japana, sveda aŭ ĉeĥa filmo? Ne, nepre ne. Sed la homoj de l' reklamkompanioj decidas alimaniere. Ekzistas tiom da filmoj, tiom da kinejoj, ke nur amasa reklamado povas elstarigi ilin antaŭ la granda publiko.

La kazo de MONATO esence ne estas alia. Inter la pli ol cent Esperanto-revuo kiuj regule aperas, inter la legaĵoj kiujn proponas al vi via nacia gazetaro, inter radio kaj televido kiuj tiel multe pli facile atingas vin, ankaŭ MONATO devas barakti por konservi, kaj plifortigi sian pozicion. Ĝi provas fari tion per siaj modestaj rimedoj, per buĝeto kiu eble egalas al unu milionono de tiu de Jurasa Parko. Pro tiu eteta buĝeto MONATO tamen ne timas. Ĝi ne timas, ĉar ĝi havas ion alian, kion la filmindustrio apenaŭ posedas: grupon da fidelaj dediĉitaj amikoj.

Al vi, niaj fidelaj amikoj-legantoj, MONATO proponas jam nun en novembro rekotizi por 1994, tiel ke perantoj kaj eldonejo ne havu tro da zorgoj por sendi memorigilojn (informojn vi trovos sur la apuda paĝo). Sed ni proponas ion plian. Kaptu la okazon, por varbi novan leganton. Se vi sendas al la eldonejo adreson de intereso pri la magazino, kaj se tiu persono poste ekabonas, vi ricevos „ŝparkonton” ĉe FEL kun 250 belgaj frankoj en ĝi. La monon vi povas uzi por mendi librojn, aŭ, se vi varbas pli da interesitoj, por pagi eĉ vian propran abonon. Ĉu tio ne estas alloga? Ĉu ne sufiĉe? Jen plia regalo:

Ĉiu abonanto, kiun vi varbas por 1994, ricevos la lastajn numerojn de 1993 senpage. Se la persono kiun vi varbas por 1994, iĝos en 1993 la dumila abonanto de MONATO, vi ricevos senpagan dumvivan abonon! Via nomo aperos en via revuo kaj la rezulto estos anoncita ankaŭ samtempe en la Esperanto-elsendoj de Pola Radio.

Ek do! Pripensu kiu inter viaj geamikoj ne jam estas abonanto kaj interesiĝas pri MONATO. Sendu al la eldonejo (adreso en apuda kadro) la liston da nomoj kaj adresoj, kaj atendu. Eble vi legos vian nomon sur tiu ĉi paĝo baldaŭ kaj oni aŭdigos ĝin en Pola Radio!

Agrablan legadon kaj... aŭskultadon!

LAL al Stokholmo

La litova flugkompanio Litovaj Aerlinioj (LAL) ĉi-jare komencis regulajn flugojn inter Vilnius kaj Stokholmo. Marde kaj jaŭde Boeing-737-200-aviadiloj zorgos pri la konekto. Post la resendependiĝo de Litovio antaŭa branĉo de sovetia Aeroflot transformiĝis al memstara litova nacia flugkompanio. Ĝis hodiaŭ ĝi multe kreskis kaj inaŭguris multajn novajn flugojn. Eblas flugi el Vilnius rekte al Almati (antaŭa Alma-Ata), Amsterdam, Berlin, Frankfurt, København, London, Moskva, Paris, Sankt-Peterburg kaj Warszawa.
Laimius STRAŽNICKAS

Sav-rato!

Lastatempe en vilaĝo Yumu, provinco Hubei, tagnokte pluvis. Kiam post la pluvo maljuna Liu plektis en sia hejmo dorsokorbon, subite alkuris granda rato, kiu morde kaptis la krurumon de la pantalono de Liu kaj tiris lin ekster la domon. Liu forpelis la raton, kiu tamen revenis kaj refoje tiris eksteren la maljunulon. Tiu estis denove forpelonta la raton, kiam inundo de monto-deklivo torente detruis la domon. Sekura estis Liu pro la insistado de savema rato.
Shi CHENGTAI


Rusa elmigrado

La prezidanta aparato de Kirgizio, unu el la novaj sendependaj ŝtatoj en Meza Azio, preparis kaj prezentis en oktobro 1993 al la registaro por aprobo agadprogramon celitan al ĉesigo de la daŭranta elmigrado de la rusparolanta loĝantaro. Dum la unuaj ses monatoj de 1993 57 mil homoj, inkluzive preskaŭ 30 mil rusoj, forveturis el Kirgizio. Dum la lastaj kvar jaroj la kirgizia parto de la loĝantaro plialtiĝis de 52,4 al 56,5 %.
Ŝildo




Jena superkamiono estis konstruita en Saĥa (Jakutio). Ĝi povas transporti 280 tunojn kaj estas uzata en la loka karbominejo.

FOTO ITAR-TASS



La supraj ekfotoj montras italajn deputitojn kaj senatanojn, kiuj provas pasi la tempon dum la „laboro”: unu informiĝas pri la seksa vivo, alia raranĝas sian ŝminkajon kaj tria sin kaŝas por povi uzi ege malpermesitan poŝtelefonon. GC




Viajn kontribuojn por la rubriko „noticoj” sendu al la eldonejo:

FEL
Frankrijklei 140
B-2000 Antwerpen
Belgio

Plej grandaj avikompanioj

en internacia lini-flugado 1991



9805 © Globus

Politiko de neeniro

La internacia rajto de rifuĝintoj formale baziĝas sur la agnosko de l' principo de nerifuzo; ĝi enhavas la postulon, ke rifuĝintojn oni resendus nek rekte nek nerekte al devenlandoj. Sed se ni analizas la nuntempan praktikon de nerifuzo anstataŭis politiko de neeniro: al rifuĝintoj oni malpermesas veni - kio ja semantike estas io alia ol rifuzo, en praktiko tamen ĝuste tio.

La novan politikon diversaj ŝtatoj realigas tre varie. Multaj simple postulas vizojn kaj tiel povas kontroli la fluon de rifuĝintoj; kiu ne havas vizon, ne povas fariĝi rifuĝinto (kio laŭ la internaciaj konvencioj estas absurdaĵo). Oni devigas avikompaniojn, kun minaco de puno, transporti el certaj landoj nur homojn kun vizoj - do la avikompania dungitaro devas plenumi la fian laboron de rifuzo. Germanio, ekzemple, starigis liston de „sekuraj“ kaj „malsekuraj“ landoj, sub la fikcio, ke en „sekuraj“ landoj homoj ne spertas persekutadon. Juĝistoj jam plurfoje pruvis, ke tiu ĉi fikcio estas falsa, ekzemple kiam bahaanoj persekutataj en Irano venis al Germanio tra Grekio, „sekura“ lando.

Malhumanaj metodoj

Eĉ pli malhumanaj estas aliaj metodoj de l' politiko de neeniro. En iuj landoj armitaj limgardistoj resendus azilpetantojn. En Francio oni kreis fikcian „internacian zonan“ en flughavenoj, tiel ke en tia zono oni povas rifuzi al rifuĝintoj laŭleĝajn rajtojn. Kurdojn en Irako oni izoligis per „sekurzono“. Pri la teruraĵoj kontraŭ haitianoj sur usona militbazo Guantanamo sur insulo Kubo ni ĉiuj legis kaj vidis multe dum la pasintaj monatoj.

Kial okcidentaj ŝtatoj renversis la principon de nerifuzo al politiko de neeniro? El la perspektivo de tiuj ŝtatoj avantaĝo de tia agmaniero estas, ke tiel ili povas kontroli migradon de rifuĝintoj, sen ke ili samtempe devas preni sur sin respondecon pri ties bonfarto - respondecon, kiu ekvalidas en la momento de eniro de azilpetanto. Historie estas klare, ke la internacia rifuĝorajto neniam servu al kontrolado de nelibervolaj migradoj, kiuj hodiaŭ fariĝis plorinda realaĵo. Ĝis kiam en la sepdekaj jaroj ekis homtorentoj el sudo al nordo granddimensie, rifuĝorajto trafis nur al homoj, kiuj estis ligitaj al celŝtatoj per etnaj aŭ politikaj ligoj.

Pro tiu ligiteco inter rifuĝintoj kaj la socioj, en kiuj ili serĉis protekton, alveno de azilpetantoj praktike apogis ekzistantan socian ordon. En iuj okazoj, ekzemple de rifuĝintoj el tiamaj komunismaj ŝtatoj, tiuj homoj eĉ estis tre bonvenaj kiel utilaj ŝakfiguroj sur la breto de ideologia batalo.

Rifuĝorajto iĝas farso

Kiam mankas tia ligiteco, rifuĝorajto estas praktike farso. Ni memoru nur la rasisme argumentitan rifuzon de okcidentaj ŝtatoj antaŭ la 2a mondmilito, akcepti judojn kaj aliajn persekutitajn minoritatojn el nazia Germanio. Nuntempe, helpe de modernaj transportiloj, amase venas homoj el plej diversaj mondpartoj, sen ligiteco etna, kultura aŭ politika al cellandoj. Registaroj rigardas la multajn almigrantajn homojn el tute aliaj kultursferoj simple kiel - fremdulojn. Estas tiu ĉi „fremdeco“, ne nur la gigantaj nombroj de rifuĝantoj, kiuj maltrankviligas kaj registarojn kaj popolojn. Malkaŝe registaroj diskonigas sian opinion, ke alfluo de homoj el aliaj kulturoj endanĝerigas socialan solidarecon en industrilandoj.

Fatala ksenofobio

Fakte, rasismaj atakoj, eĉ murdoj, fare de indiĝenoj kontraŭ fremduloj en pluraj okcidenteŭropaj landoj, precipe en Germanio kaj Francio, demonstras efikojn de tiu ĉi fatala politiko. Oni povas disputi pri tio, ĉu unue estis fremdulotimo en la popoloj kaj poste politi-

kistoj ekspluatis nebulajn angorojn por siaj celoj, aŭ ĉu sloganoj de politikistoj kiel „la boato estas plena!“ ekscitis tian ksenofobion. Probable unu fenomeno influis kaj akriĝis la alian ĝis la eksceso. En tia situacio, moderajn politikistojn kaj aliajn avertantajn prudentulojn oni ne plu emas aŭskulti kaj sekvi.

Eviti respondecon

Registaroj do sen tro grandaj problemoj povas utiligi rimedojn por haltigi torentojn da rifuĝantoj. Ne volante tamen nuligi formale azilrajton - oni ja daŭre bezonas ĝin por akcepti rifuĝintojn kun la menciita ligiteco! - registaroj do aplikas la metodon de neeniro, ĉar tiel oni kredas solvi la problemon, evitante evidentan konflikton inter laŭleĝa retoriko de respondeco kaj socia antipatio kontraŭ fremduloj.

Rezigno pri komforto?

Unu el la argumentoj por tia agado, cetero, estas: por la homoj estas multe pli bone, ke ili restu en siaj landoj kaj tie akceptu nian helpon; tio kostas malpli multe por industrilandoj. Prave, ĉar neniu homo senbezone emas forlasi sian landon, se en ĝi oni povas vivi digne; do krei dignajn kondiĉojn, devas esti la celo. Sed kiel tio okazas, ni vidas momente en Somalio; ke ĉi tiu rimedo efikas nur limigite, ni vidas en eksa Jugoslavio kaj multaj aliaj krizoregionoj de l' mondo. Por vere solvi la problemojn, ni bezonus tute novan, mondan strategion, kiu inkluzivas certan, ja drastan rezignon pri komforto en industrilandoj. Kiu okcidenta registaro aŭdacus diri tion publike? Tia strategion de novaj mondaj kulturo, ekonomio kaj politiko por digno de homoj devus ellabori UN - sendi soldatojn al konfliktoregionoj ne sufiĉas.

Stefan MAUL

Kie ili trovas protekton

Rifuĝintoj (en miloj) registritaj de UN-Komisariato por Rifuĝintoj



Ĉu lando tion meritas?

La konstatoj de s-ro Jones (MONATO, 1993/9, p. 8) estas vere ridindaj. En neniu bosnia urbo vivis „nur serboj”, kaj ne „aŭtoktone”, ĉar Kroatio venigis ilin ĉe la defendolimo kontraŭ turkoj. Bosnion ili venis por labori sur bienoj de islamanoj. Poste dum la agrarreformoj (jugoslavaj – legu serbaj) ili ricevis grandegajn terenojn senpage. Nun ili okupas vilaĝojn kie vivis 90 ĝis 100 % da islamanoj kaj liberigas lokojn, kie neniam vivis iu serbo. Ne veras same, ke Bosnio kaj Kroatio perforte disiĝis, kaj ke serboj serĉas la saman rajton en tiuj regionoj. Fakte temis pri perforta starigo de granda Serbio. Se serboj serĉas la saman rajton, ili donu tiun unue al siaj albanoj en Kosovo kaj islamanoj en Sandžak. Nur islamanoj en Bosnio estis vere por Jugoslavio kaj estis tute ne preparitaj por la civil-milito. Se iu rajtas je la Nobel-premio pri paco, estas Alija Izetbegović, kaj certe ne la duopo Milosević-Karadžić. Jugoslavio puniĝis per blokado pro la tute videbla agreso de serboj unue kontraŭ Slovenio, poste Kroatio, Bosnio... Volontuloj-batalantoj el Rusio kaj Rumanio ekde la komenco elektis la serban flankon, kvankam ili ricevis leĝe la modernan armilaron de la jugoslavia armeo. Ne hazarde la blukaskuloj defend-et-as la islamanojn kaj malpermesas irananon tion fari. Estas tute nekompreneble ke iu povas havi tiel purigitan cerbon ke li akceptas la sangan buĉadon de homoj (ankaŭ virinoj kaj infanoj) kiel humanan taskon de frato kiu helpas fraton. Pri demokratio ekzistas nur fabeloj. Ĝin volas ĉiuj normalpensantaj serboj kaj neserboj, sed ili rajtas nur je sopiro pri libereco kaj demokratio. Restas do la demando: kial tiel puniĝas la lando? Sed ĉu vere mankas la respondoj? Mi tutkore same respondas, „Ne, tiu lando vere ne meritas tion!” Sed mia opinio tute malsimilas de tiu de kaŝemulo Jones, kiun tamen subtenas preskaŭ la tuta mondo.

Smajlo Grbo, Bosnio

N.d.l.r.: La vera nomo de s-ro Jones ja estas konata al la redakcio. Ĉar li mem opinias danĝere mencii sian nomon la redakcio akceptis tion. Neniu povas nei ke li loĝas en „danĝera” mondoparto (eĉ se li apartenas al la flanko de la ĝisnunaj „venkantoj”).

Kiu krucmilitas kontraŭ islamo?

Laŭ nova tezo de Gerrit Berveling (MONATO, 1993/9, p. 8) la ekstera politiko de prezidantoj Bush kaj Clinton

resumiĝas al usona deziro malutili al islamo. Kiel pruvon li mencias la militon kontraŭ Irako kaj la tragedion en Bosnio. GB traktas la batalon kontraŭ Irako kvazaŭ usonan klopodon revivigi la krucmilitojn kontraŭ islamo. Erare! Laŭ rajtigo de UN Usono gvidis koalicion de trideko da ŝtatoj el kvin kontinentoj por liberigi islaman landon, kiun Irako estis atakinta kaj aneksinta. Precize la venko de aliancantoj ebligis al Usono kunvenigi la konferencon de Madrido inter Israelo kaj ĝiaj islamaj najbaraj ŝtatoj kaj tiel lanĉi pacprocedon kies unua rezulto estas la interkonsento inter Israelo kaj PLO pri reciproka rekono kaj komerca aŭtonomeco palestina. En Bosnio Usono laŭaserte decidis ne agi tial ĉar Usonon nur interesas milito kontraŭ islamo? Usono nenion faras krom malpermesi liveradon de armiloj al islamanoj. Erare! Ĝuste Usono proponis la nuligon de tiu malpermeso, sed la du konstantaj okcidenteŭropaj membroj de la Sekureca Konsilio, Francio kaj Britio, kontraŭis. Kaj diable, kial Eŭropo entute bezonas Usonon por solvi pure eŭropan problemon? Pri la tragedio en Bosnio kaj ĝia solvo respondecas sole kaj ekskluzive ni prosperaj eŭropanoj (entute 370 milionoj da homoj). Kion faris nia kontinento kiam Serbio atakis Slovenion kaj Kroation kaj cinike detruis la sendefendan adriatikan urbon Dubrovnik? Absolute nenion! Kion faris Eŭropo kiam serboj kaj eĉ kroatoj atakis Bosnion kaj ties islamanojn? Eŭropo laŭte protestis, sed samtempe Francio kaj Britio anoncis ke ili ne intencis uzi militan forton kontraŭ la agresantoj. Kiam Eŭropo finfine komprenos ke tiu kiu rezignas la minacon de la forto neniam plu disponos la forton de la minaco? Eskil Svane, Francio

Clinton

S-ro Berveling pravas pri sia kritiko de la usona politiko (MONATO, 1993/9, p. 8). Mi tamen aldonus, ke la ĉefa motivo de Clinton ne estas kontraŭ-islameco, sed malpopular-eco. Laŭ mi, denove atakante Irakon, li klopodis plipopulariĝi, kiel sia antaŭulo, Bush, klopodis (kaj sukcesis) per la 1991 kontraŭ-iraka milito. Clinton subtenas la ideon de militkrima tribunalo en Bosnio. Ĉu li mem ne aperu antaŭ tia tribunalo?

Marko P. Maertens, Kanado

Moldavio

Min mirigis la artikolon de A. Ĉebotaru (MONATO, 1993/8, p. 8), kiu igis

min reeĥi. Pravus redakcio, ke ĝi estas unuflanka raporto, eĉ iagrade erara. Ekzemple, ĉu rajtas civitano de Moldovo (aŭ Ĉednestrujo) nomi moskvan gazetaron kiel centran, ĉu li (aŭ ŝi) daŭrigas sian sovetian civitanecan? Ĉu por li (aŭ ŝi) centro restis en Moskvo? La unua klarigo sub la mapo informas „ŝtatlimo” (Moldavio-Rumanio). Denove eraro, ĝi estas eksa ŝtatlimo de la eksa Sovetio. Nun parto de tiu limo servas kiel ŝtatlimo inter Ukrainio kaj Rumanio. Plue, s-ro Ĉebotaru skribis pri popolo de Ukrainio kaj Rusio. Ĉu ĝi restis la iama „sovetia popolo”, aŭ ĉu temas pri du popoloj? Mi ne memoras, ke ukraina popolo pretis „sendi siajn kozakojn” al Ĉednestrujo. – Kozak estas turka vorto kun la senco de gardisto, soldato; poste en la turka ĝi eksignifis „rabisto, vagabondo”. Nome tiel turkoj kaj tataroj krimeaj „baptis” ukrainojn, kiuj prirabadis konstante iliajn karavanojn. En la fino de la 15a jarcento kozakoj komuniĝis en ŝtato-organizaĵo Zaporoga Siĉ (pri la 500jara datreveno informis MONATO en 1991). Rusa imperiestrino Katarina 2a likvidis ĝin en 1775. En Moldovo batalis rusaj kazakoj de la rivero Don. Siatempe ukraina registaro malpermesis trapasi al tiuj soldatoj-volontuloj tra Ukrainio (de Rusio al Moldovo). – Kelkaj malĝustajetoj penetris ankaŭ en redaktan historian paĝon pri Moldovo. „Slava loĝantaro (precipe rusoj)... – frazo tiu estas neĝusta, ĉar rusoj uzas nur slavan lingvon, etne (gente) ili apartenas al ugro-finoj. Due, centro de moldavaj bulgaroj – Bolgrad – nun apartenas al Ukrainio, al odesa provinco (vidu la mapon sur p. 8). Antaŭ kelkaj tagoj en tiu urbo ekfunkciis la unua en Ukrainio bulgara gimnazio. Solene inaŭguris ĝin reprezentanto de ukraina prezidanto s-ro I. Iljin. Ekde la 1a de septembro 1993 etnaj bulgaroj havos la eblecon lerni ĉiujn lerneajn fakojn nacilingve, nur ukraina lingvo estos sola fako, instruota ukraine (fremde).

Viktor Pajuk, Ukrainio

Eterna Helaso...

Jen komento (MONATO, 1993/8, p. 23): En gimnazio mi studis la klasikan formon de la latina kaj la greka. En ambaŭ depost tiom mi daŭre legas librojn, do daŭre uzas la lingvojn kaj eĉ tradukas de ili al Esperanto. Kiam mi vizitis Italion, surbaze de mia scipovo de la latina (klasika) kaj helpate de lili-puta vortareto dudirekta post nuraj tri semajnoj mi revenis hejmen kun la

konstato, ke mi sukcesis kompreni la parolatan italan, legi ĝin kaj eĉ iomete partopreni en debato. Eĉ se mi ne reagas la lingvon, mi povas ĝin uzi, ĉar la nuntempa itala, pluevoluinta formo de la klasika latina, sufiĉe similas al ĝi por transiri de la klasika al la moderna formo. Male, miaj spertoj pri la greka: mi intense studis ĝin en universitato kaj post tio vizitis Grekion. Helpe de ampleksa vortaro dudirekta, mi eĉ nur ege pene povis deĉifri kelkajn paĝojn en libreto por mezlernejoj: traduko novgreka de Herodoto, kies klasikan tekston mi ja konas kaj tradukis Esperanten! La lingvo tiel profunde ŝanĝiĝis. Ne nur la prononco, ne nur la nove enkondukitaj vortoj, ne nur la disfalo de la kazosistemo... Eĉ de la verba sistemo restas preskaŭ nenio rekonebla! Poste mi sekvis kurson pri la novgreka, ree vizitis la landon (nun akompane de pli granda vortaro). Mi povas traduki el la greka, sed paroli, ho ve! Apenaŭ mi kapablas ion mendi, apenaŭ diri „Saluton!”. Mi do entute ne povas konsenti kun la aserto de Makaj rilate la grekan: „Neniu alia eŭropa lingvo tiel malmulte ŝanĝis sian karakteron, post tiom da tempo”.

Gerrit Berveling, Nederlando

Pri la japana lingvo

Jen komento pri la artikolo „La Japana” en la rubriko „lingvo” (MONATO, 1993/9, p. 20). Temas pri la frazo: ...denaskaj parolantoj, ekzemple en Koreio... estas tre malmultaj... Jes, reale, krom kelkmil familianoj de la diplomatoj, komercistoj, studentoj, instruistoj, ĵurnalistoj, sciencaj esploristoj aŭ turistoj japanaj kaj kelkaj transloĝantoj koreaj, naskitaj en Japanio, restantaj en Koreio, nun neniuj koreoj estas denaskaj parolantoj de la japana, ĉar jam pasis du generacioj, post kiam la milionoj da japanoj retiriĝis al sia lando pro la malvenko de la milito. Kaj kvankam loĝas dekelkaj japanaj edzinoj jam maljunaj de koreoj, ili ne instruas sian denaskan lingvon al siaj infanoj denaske pro la forta etnismo de najbaraj koreoj (kaj la oficiala kaj privata statistiko ne montras ties nombron: nur iliaj amikecaj kluboj kun kelkdekaj membroj estas raportataj). En la japanaj skribsignoj la aŭtoro aŭ kompostisto iom miksis la hiraganan kaj la katakanan skribsistemojn. Malgraŭ tiuj konfuzoj mi laŭdas la esploron pri la japana de s-ro Bradley Kendal.

AHN Son-san, Koreio

Mondolingvoj

Kutime mi ne re-reagas al legantleteroj, se ne estas petite, sed ĉi-foje

mi ne povas ne. Unuflanke mi forte substrekas la ĝeneralan diron de s-ro Alos i Font (MONATO, 1993/9, p. 6). Sed ĉe lia ĉefa ekzemplo mi kontraŭas. La demando, ĉu la baha lingvo povus funkcii kiel mondlingvo, altrudas sin, ĉar en ŝtata skalo ĝi jam estas interlingvo, en tiu kadro neŭtrala. Oni devas nei la demandon, sed (kiel skribas s-ro Kendal) „devus esti inspira kaj instrua”. Kompreneble la cetera politiko de Indonezio ne meritas tiun karakterizon. Krome: La elekton de la malaja kiel bazo por la indonezia ne kaŭzis militvenko, sed komerca graveco; kaj la aserto, ke „ne ekzistas genta idiom pli facila ol alia”, estas simple malvera. – Krei la rubrikon „La mondo en...” estis bona kaj bonege realigita ideo. Ĉu oni povus esti pli aktuala, se oni ne skribus pri kalendarmonatoj, sed komencus je alia fiksa dato (la 10a aŭ eĉ pli malfrue?) Cetero mi proponas eldoni ĝin surdisko ĉiujare, por ke oni povu ankaŭ respondi la demandon: „Kiam okazis...?”

Reinhard Pflüger, Germanio

N.d.l.r.: *Fiksi alian daton por komenci la rubrikon „La mondo en...” ja eblas, sed ne funde pliaktualigus la rubrikon. Ni akurate ricevas la informojn je la unua de ĉiu (sekva) monato, la tempo kion bezonas kompostado, provlegado, presado kaj ekspedado kaŭzas la diferencon inter skribo- kaj apero-tempo. Eldoni la rubrikon surdisko estas perfekte eble, interesoj sin anoncu!*

Pri la enhavo de leteroj respondecas la aŭtoroj mem. La redakcio havas la rajton mallongigi leterojn. Reagoj al artikoloj ricevas prioritaton. Skribu al:
FLANDRA ESPERANTO-LIGO
MONATO (Leteroj)
Frankrijklei 140
B-2000 Antwerpen
Belgio

Ina ŝerco iĉe

Robert Robertson komentis (MONATO 1993/8, p. 7) pri la „malŝercoj” en la aprila numero. Mi devas diri ke certe ne estis superŝute laŭda poŝtaĵo pri la humuro de NikSt. Tamen, ĉu ne temas pri ĝuste kiel oni legas ŝercojn? Ofte, se viro rakontas ŝercon pri virinoj, aŭskultanta feministino povas subkompreni seksismon. Sed analizu ilin... virino ĝojas, ĉar ŝia amiko mortpafis edzinon: la virino estas

stulta, la viro krima; iu ulo iras al la apoteko por veneni la bopatrinon: li estas stultulo, sed la bopatrinino meritas la morton; policano diras ke li edziĝis al mensogo-detektilo – li estas do mensogema, la edzino estas lerta. Kiu sekso estas la viktimo? Humuro celita al virinoj ne estas en si mem seksisma. Seksismo estas malsano, kaj senkora rikanado kontraŭ iu ajn neofenda grupo estas malaprobinda. Nemalicaĵoj pri nia homa socio ne povas esti pli ol simptomo de malsano – kaj kompreneble oni kuracas ĝuste malsanon, ne simpton. Sed Robert Robertson ŝajne ne bone atentis mian enkondukon al la ŝerco: „... se edzinoj kaj fianĉinoj vidiĝas kiel iaj monstroj, eble oni serĉu la kulpon ĉe la viroj...” Kaj dum temas pri seksismo, kial li parolas al la (vira) redaktoro de MONATO kvazaŭ ĉiu havas edzinon kaj filinon. Denove tiu diskriminacio, ku antaŭsupozas ke ĉiu viro havas la saman naturon kiel s-ro Robertson...

Seán Osborne, Nederlando

Kongresa enketo

Male de via voĉita konjekto (MONATO, 1993/9, p. 31) la matematikistoj certe ne konsentas koncerne vian enketon en Valencio. Estas vere, ke kondiĉe, ke vi ne estas stariginta vian budon rekte apud iu kondomdisponigilo en la vira necesejo, la akirita specimeno en via enketo povas ja esti hazarda kaj reprezenta. Via specimeno konsistis el 108 personoj. Vi estas nombrinta 48 abonantojn de MONATO, kio estas ĉirkaŭ 44 % de la specimeno – sed ne de la kongresanaro. Laŭ la matematiko la atendota procentaĵo de abonantoj el populacio de mil eroj, jen la kongresanaro, estas ĉe konfidencnivelo de 95 % ie inter 35 % kaj 53 % – rezulto, kiu ne ekzakte elstaras pro sia ekzakto. Mi krome substrekas, ke la specimeno kaj tial ankaŭ la rezulto kompreneble nur permesas konkludojn pri la kongresanoj en Valencio. Plu esplorante jenajn 48 trovitajn abonantojn, tiel eĉ ankoraŭ pli malgrandiginte vian specimenon, vi statistike komplete subfekiĝis, ĉar la specimeno nun estis atinginta nivelon danĝere malsufiĉa. Estas bedaŭre scii, ke rilate aŭ al la tuto da abonantoj ĉe la kongreso, aŭ al la tuto da abonantoj mondwide, aŭ al iuj nebulaj svarmoj da varbotaj abonemuloj, neniom da ĝeneraliginda praktika signifo estas deduktebla de ĝuste tiu ĉi mezuraĵo.

Simono Pejno, Germanio.

HUNGARIO

La prokrastita krizo

Politika stabileco en Hungario rompiĝas pro buĝeta elreviĝo.

Inter la iama socialisma bloko, Hungario estas la sola lando, kie nur unusola demokrata baloto okazis. Ŝajnas, ke tiu stabileco rompiĝis ĉi-somere. Tiam evidentiĝis, ke la buĝeto enhavas revojn kaj ne konkret-aĵojn. Nome la enspezoj ne realiĝis, ĉar la ekonomia dekadenco daŭras. Sekve la kabineto prezentis suplementan buĝeton.

Partikrizoj

Dume, kiel infekto, kreskis krizo de la partioj. La unua simptomo aperis ĉe la socialdemokratoj kiuj, anstataŭ unusola forta partio, politikas en ses partioj. La malsano atingis du koalici-ajn partiojn. La Etbienula Partio interese dividiĝis. En la oficiala partio restis nur kelke da parlamentanoj kune kun la partiestro kaj kun konsiderinda popolamaso. Ili iĝis opoziciuloj. Aliparte grandnombraj etbienulaj parlamentanoj en aparta frakcio apogas la koalicion.

En la plej granda partio MDF vicpartiestro verkisto-politikisto Csurka [Ĉurka] komunikis siajn tezojn en la partia periodaĵo, kiun li mem redaktas. La tezoj mondvaste efiĝis, eĉ tio estas debatita en la usona parlamento. Laŭ Csurka ministrestro Antall malsanas, tial oni preparolu kiu estu la posteulo. La malsano estas vera, sed la ministrestro estas funkcikapabla. Alia tezo diras, ke el Jerusalemo oni gvidas la hungaran kabineton. Tio estas politika stultaĵo kaj kaŝas kontraŭjudemon. Pro la similaj tezoj du MDF-

frakcianoj nomis Csurka-n faŝisto. La longe hezitema Antall fine agis. Kaj la csurkaistoj kaj la „faŝistoj” estis forigitaj. La bloko de Csurka fondis novan partion kaj frakcion Hungara Vero. Responde Antall kvazaŭdiris: Inter la forigitaj troviĝas eksa denunciisto. La aludo ŝokis la publikon. Ja la parlamento ne povis kodigi leĝon pri kondamno de la komunismaj denunciistoj, tial ili blokis ĉiujn informojn pri tio. Abrupte en la partia periodaĵo Csurka konfesis: En 1957 en la prizono mi estis listigita, sed denuncon mi neniam faris.

En tiu varmega etoso komenciĝis la voĉdonado pri la suplementa buĝeto. Laŭ la ĵurnalistoj plimulto en la koalicio estas jam nur du voĉoj. Sed surprize la koalicio atingis 56 %. Iom da opoziciuloj forestis, tiu kreskigis la koalician venkon. Evidentiĝis, ke la opoziciaro nun ne aspiras pri la estrado. La kabineto trankvile povas plu labori ĝis la balotoj okazontaj en sekvonta printempo. Jen, oni kodigis leĝon pri la minoritatoj, kiun eksterlandaj fakuloj laŭdas. Estas menciinde, ke ĉirkaŭe Slovenio kaj Ukrainio jam havas similan leĝon kaj Slovakio nun faris leĝon pri uzado de la nomoj.

Venko laŭ tiu de Clinton

La partioj jam nun pretiĝas al balotado. Tri blokoj havas ŝancojn. La unua estos eble la socialistoj, simile kiel en Litovio. Tamen ili ne regos, ĉar sola la partio ne atingos la plimulton kaj la ceteraj partioj ne volas partneriĝi. La nuna koalicio verŝajne ne ripetos la venkon de 1990. Estas demando, ĉu ministrestro Antall – kiu estas lerta taktikisto – trovos novajn partiojn. Nenie en la mondo oni estas kontenta pri la kabineto; precipe ne en Hungario, kie dum tri jaroj la kabineto ne produktis ekonomian ekprosperon. Tamen multaj opinias, ke ili jam spertiĝis kaj ne fidis al la ne sperta liberala bloko. Sed la partiestro de FIDESz, Viktoro Orbán opinias alimaniere: Ĉi tiu kabineto el ruinoj konstruis ruinojn. Ankaŭ la alia liberala partio SzDSz havas junan partiestron, Ivan Pető. Ambaŭ partiestroj atendas furoran venkon, kiel Clinton en Usono.

JUHÁSZ Károly

AŬSTRALIO

Ĉu demokratia baloto?

En marto okazis en Aŭstralio elektoj por la federacia parlamento. La Laborista Partio ricevis plimulton kaj denove nomis la registaron, kun Paul Keating [Kitng] kiel ĉefministro. Kaj denove la aŭstraliaj demokratoj kaj aliaj malgrandaj grupoj gajnis malpli grandan procentaĵon de la sidlokoj en la Ĉambro de Rerezentantoj ol ili ricevis da voĉoj. Nur en la Senato, por kiu oni uzas en ĉiu ŝtato proporcian sistemon de balotado, la minoritataj partioj havas procentaĵon proksiman al la idealoj de la Deklaracio de Homaj Rajtoj.

Denove oni diskutas la referendumojn de Nov-Zelando (1991) kaj Aŭstralia Ĉefurba Teritorio (1992).

En sia artikolo (MONATO 2/1993) D.E. Rogers aludis al la nov-zelanda komisiono de 1986. Tiu komisiono raportis i.a. ke la nov-zelanda voĉdonmetodo havas gravajn mankojn. La problemoj estas: la metodo estas maljusta al grandaj partioj kaj al malgrandaj partioj; la metodo ne certigas efikan reprezentadon aŭ partoprenon de la voĉdonantoj; la voĉoj por malgajnintaj kandidatoj malpli valoras ol voĉoj por gajnintaj kandidatoj; malplimulto de la voĉoj decidis kiuj kandidatoj fariĝos deputitoj. Ekzemple 700 voĉoj en 7 distriktoj en 1987 kaj 154 voĉoj en 3 distriktoj en 1981 povis ŝanĝi la registaron.

Proporcieco

La referendumo de 1992 en AĈT donis elekton inter du sistemoj: la sistemo de unu deputito por ĉiu distrikto, kaj la proporcia sistemo de Hare-Clark, uzata en Tasmanio. La subtenantoj de ĉi tiu sistemo montris per granda rado la rezultojn en kvin unudeputitaj distriktoj kaj tiujn kiam oni kreis unu kunmetitan kvindeputitan distrikton. Pli ol 70 % indikis preferon por la sistemo Hare-Clark. Tiu sistemo, speco de kiu estas uzata por la federacia senato, atingas proporciecon por la starigo de kvoto da voĉoj, kiun kandidato devas ricevi por esti elektita, ekzemple en kvinmembra distrikto, kiam kandidato ricevas 16,7 % el la validaj voĉoj, li estas tuj elektita kaj aldonitaj voĉoj estas dividataj inter la kandidatoj, kiuj ĝis tiam ne ricevis kvoton, proporcie al la duaj preferoj indikitaj en ĉiuj voĉoj por tiu kandidato. Kvoto por sep-membra distrikto estus 12,5 %. ➤



Haragrante: buĝetaj mankoj zorgigas la hungaran ĉefministron Antall.

La komplikeco de la sistemo kelkfoje rezultigis multajn neefikajn voĉojn, sed la procentaĵo de nevalidaj voĉoj estis malpliigita ĉi-jare. La elektada oficejo donis klarajn instrukciojn per broŝuroj en 14 lingvoj kaj per televido, kaj ankaŭ la voĉdonantoj havis la alternativon aŭ voĉdoni por ununura partio, aŭ vice por ĉiuj kandidatoj por la senato. Multaj uzis la simplan sistemon, en kiu la preferoj estas fakte deciditaj de la partioj.

La „miksista” germana sistemo, kiun mencias Rogers, ne estas uzata en Aŭstralio. En tiu sistemo, parto de la deputitoj elektiĝas per unudeputitaj distriktoj, sed alia parto laŭ la proporcia voĉdonado por la partioj, se partio ricevis minimume 5 % el la voĉoj. La sistemo estas justa al la partioj, sed ankoraŭ donas al ili la efektivan elekton de la personoj, kiujn ili nomumas por „sekuraj” seĝoj aŭ metas al la supro de la partiaj listoj.

La Laborista Partio anoncis, ke ĝi starigos komitaton por studi la dezirindecon ŝanĝi Aŭstralion en respublikon okaze de la centjara datreveno de federacio en la jaro 2001. Por tio referendumo estus necesa, sed oni povas ŝanĝi la voĉdonsistemon per parlamenta leĝo.

Ralph HARRY kaj Katie WRIGHT

Amikeco kun Ukrainio

Neatendita longa disputo okazis en la hungara parlamento pri ratifo de la ukraina-hungara amikeca traktato, kiun deputitoj unuvoĉe laŭdis. Tamen malgranda plimulto rifuzis paragrafon, laŭ kiu ambaŭ ŝatoj reciproke rezignas pri teritoriaj pretendoj unu kontraŭ la alia. La paragrafo eniris la tekston laŭ peto de Ukrainio.

La opozicio kaj la ceteraj koalicianoj jesis al la paragrafo, sed aliaj parlamentanoj opiniis, ke ĝi estas unuflanka rezigno, ĉar temas pri Rutenlando. La rutenoj vivas ambaŭflanke de la nord-orienta parto de Karpatoj. La iamman sudan Rutenlandon unue Hungario, poste Sovetio okupis. La lasta aranĝis referendumo-komedion, laŭ kiu la loĝantaro volis aparteni al Sovetio per 99 % da voĉoj.

Nun Ukrainio sendependiĝis sen esti rajto-heredanto de Sovetio. La traktatoj ne validas por Ukrainio. En tiu kriza stato Hungario kiel unua agnoskis sian novan najbaron sendependa ŝtato. La hungara kabineto opinias, ke la traktato, kiun finfine akceptis parlamenta plimulto, plibonigos la sorton de la hungara minoritato en Rutenlando.

Karlo JUHÁSZ

INTERNACIA KORTUMO

Kies akvo?

Pri tiu demando la Internacia Kortumo decidis en Hago. En la bolŝevisma erao Hungario kaj Ĉeĥoslovakio komencis konstrui komunan akvo-energian centralon ĉe landlima parto de Danubo. Dume pro mediprotektaj argumentoj la hungaroj eksigis, senvalidigis la kontrakton. La slovakoj devis finkonstrui solaj la centralon. Ili baris la riveron tie, kie Danubo apartenas ambaŭflanke al Slovakio. La akvo en longa betona kanalo fluas paralele laŭ la rivero kaj post la centralo denove atingas la jam komunan riveron. Sekve difinita Danubo-parto restis senakva. Pli precize apenaŭ fluetas iom da. Pri la menciita riveretapo la packontrakto estas valida: Limo de ambaŭ landoj estas la mezo de la navigebla parto. Nun la ŝipoj povas uzi nur la kanalon.

Nun ĉe la barilo la kanalo ricevas ĉirkaŭ 90 centonojn de la akvo. Laŭ sugesto de internaciaj organizaĵoj ambaŭ landoj kompromisu en la akvodisdivido, ekzemple en la proporcio 1 : 1. Sed evidentiĝis, ke funkciado de la centralo konsumas preskaŭ la tutan akvon. Ja rezigno pri akva fluo egalas rezignon pri elektra fluo. Aliloke la regiono ne ricevas sufiĉe da akvo; verŝajne okazos dezertiĝo. Ĉesos la kutima agrikulturo.

Tio estas mezurebla damaĝo de la hungaroj.

La ekonomia diskuto disvastiĝis je politika nivelo per minoritataj problemoj. Tamen neniu lando prenas armilojn, sed atendas verdikton de la Internacia Kortumo.

JUHÁSZ Károly

Unuafoja vizito

Fine de julio vizitis Tanzanion por la unua fojo Federico Mayor, direktoro de la organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo (UNESKO).

Pasigis Mayor tri tagojn en la lando kiel gasto de tanzania ministrejo pri scienco, teknologio kaj altedukado. Solene inaŭgurinte t.n. malferman universitaton (instruiĝas studentoj ĉefe per poŝtaj kaj televidaj kursoj), Mayor kunsidis kun la prezidanto de Tanzanio, Ali Hasani Mwinyi, kaj kun la ĉefministro John Malecela.

Post la vizito al Tanzanio la UNESKO-direktoro flugis Zanzibaren cele al eventuala surinsula progresigo de kulturo kaj komunikado.

Constantine S. MASHAURI

* Viajn kontribuojn por la rubriko „politiko” sendu al:
Paŭlo Gubbins
3 Arden Court

Mossley, Congleton,
Britio CW12 3JH

opinio

Etnisma koŝmaro

Kvankam la teruro-buĉado en Bosnio ne estas komparebla kun la multe malpli vasta teroro en Nord-Irlando (kie granda parto de la loĝantaro vivas relative trankvile), ne forestas kelkaj similaĵoj inter la du teritorioj. Laŭ lastatempa demografia studo farita en Nord-Irlando, 90 % – preskaŭ nekredbla proporcio – de la tiea popolo nun loĝas en apartigitaj gettoj katolikaj aŭ protestantaj, kie homoj de la kontraŭa religia tradicio estas almenaŭ malbonvenaj, kaj ne malofte sub minaco de morto aŭ bruligo de sia domo. Tiu apartigo povus esti rigardata kiel rezulto de agado iom simila al la tiel nomata „etna purigo” en Bosnio.

Tamen, eleksteraj observantoj prave demandas, en kia senco konflikto en la du landoj povas esti „etna”? En ambaŭ la implikitaj partioj apartenas al la

sama aŭ parenca loka gento; parolas la saman lingvon, aŭ iomete diferencan formon aŭ dialekton de la sama lingvo; sed konfesas malsamajn religiojn, aŭ variantan formon de la sama religio – aŭ tute ne praktikas iun ajn – kaj vivas laŭ iom diverĝanta tradicio. Kompreneble, sociaj kaj politikaj faktoroj ludas gravan rolon.

Simile, en ambaŭ teritorioj, homoj kiuj dum longa tempo najbare (se ne ĝuste amike) kunvivis kaj sin toleris, sin konis kaj interrilatis, nun reciproke elpelas kaj murdas najbarojn, detruante komunajn kaj privataj posedaĵojn, inkluzive de siaj propraj urboj kaj vilaĝoj.

Ne estas mirinde, se multaj nun pesimisme demandas, kiom da espero restas, ke Eŭropo – sen konsideri la homaron ĝenerale – povos unuiĝi kaj konservi la pacon. En du malgrandaj teritorioj loĝataj de supozeble normalaj homoj, oni mizere malsukcesis. Garvan MAKAJ’, Irlando

Disduiĝo

La Socialista Partio venkis en la ĉi-jaraj balotoj. Por la kvara fojo sinsekve ĝi atingis plimulton en la parlamento, kvankam unuafoje ĝi ne sukcesis ĝishavi la duonon de la seĝoj. Ioma malkresko de la socialistoj kaj forta supreniro de la Popola Partio (dekstro) preskaŭ niveligis la parlamenton. Dekoj da antaŭbalotaj esploroj aŭguris tre malcertan rezulton. Fine de aprilo ĉiuj prognozoj anoncis ioman venkon de la Popola Partio. Dek unu jaroj da regado forte pezis al la Socialista Partio, kiu devis en la lastaj monatoj alfronti akregan ekonomian krizon kaj enormajn skandalojn pri koruptado. Kuraĝa kampanjo de ĉefministro González, kiu plu restas la plej ŝatata hispana politikisto, niveligis la antaŭvidojn kaj skrapis kelkajn elcentajn poentojn.

Televideo ĉefrolis dum la kampanjo. Elstaris du debatoj inter la du ĉefaj kandidatoj, kiujn spektis 10 milionoj da civitanoj. En la unua, agresa Aznar el la Popola Partio klare puŝis en angulon nereagantan González. En la dua debato, okazinta la semajnon de la balotoj, la socialista kandidato evidencigis mankon de konkretaj solvoj fare de la opozio.

Pro la malcerta rezulto, la partopreno forte kreskis ĝis 77,5 % (70 % en 1989), malgraŭ gravaj eraroj en la listoj de voĉdonantoj. Tio favoris la grandajn partiojn rilate la etajn, kies subtenantoj ofte estas politike pli engaĝitaj kaj balote pli partoprenemaj. Post tri parlamentoj kun absoluta plimulto, Hispanio alfrontas periodon, dum kiu la reganta partio devos interkonsenti kun aliaj pri la farota politiko. Hektor ALOS I FONT

	1993 Deputitoj %	1989 Deputitoj %
PSOE (socialista)	159 38,68	175 39,87
PP (dekstra)	141 34,82	107 25,97
IU-IC (maldekstra)	18 9,57	17 9,13
CDS (centra)	0 1,76	14 7,95
CiU (kataluna)	17 30,95	18 32,89
EAJ (eŭska)	5 24,03	5 22,93
CC (kanaria)	4 25,63	1 9,44
HB (eŭska)	2 14,59	4 16,98
ERC (kataluna)	1 4,95	0 2,79
PAR (aragona)	1 19,06	1 10,97
EA-EUE (eŭska)	1 9,87	1 11,24
UV (valencia)	1 4,71	2 6,87

Rezultoj de la hispanaj parlamentaj balotoj en 1993 kaj 1989. (La elcentoj de la naciaj partioj estas en siaj teritorioj – por la eŭskaj partioj, sen Nafaro.)

LA MONDO EN SEPTEMBRO 1993

Rusio

1a. Jelcin, rusa prezidanto, suspendas sian vicprezidanton Ruckoj kaj vicĉefministron Ŝumejko pro suspekto je koruptado. La lukto pri la politika povo en Rusio akriĝas.

6a. La sekureca servo baras al eksvicprezidanto Ruckoj eniron en Kremlo.

16a. Gaidar, progresama, ekonomia reformisto, kaj demisiigita ĉefministro revokiĝas en la rusan registaron.

21a. Jelcin dissolvas la parlamenton kaj anoncas parlamentajn elektojn en decembro. Ĥasbulatov kaj Ruckoj, la ĉefaj reprezentantoj de la reacia parlamento, nomas la dekreton de Jelcin puĉo kaj kontraŭkonstitucia. Ili intencas defendi sin per ĉiuj rimedoj. La tuta mondo kaj neklara grandparto de Rusio apogas la politikon de Jelcin. La rusa armeo kondukas neŭtrale, sed finfine staras flanke de la prezidanto.

Eksa Sovetio

3a. Ukrainio vendas la nigramaran ŝiparon al Rusio. Tiu nuligas la monŝuldojn de Kievo.

5a. Armenio reokupas parton de Azerbajĝano, kiu alproksimiĝas al KŜŜ.

14a. Ŝeverdnadze, kartvela prezidanto, demisias post riproĉo, ke li volas starigi diktaturon. Sed samtage li rezignas pri tio kaj ricevas eksterordinarajn povojn; la eksterordinara stato konfirmiĝas.

27a. Post akcepto de la demisio de ĉefministro Kuĉma, la ukraina prezidanto Kravĉuk abolas la ĉefministran postenon kaj mem transprenas la registaran povon.

27a. Suĥumi, ĉefurbo de Abĥazio, falas en la manojn de la abĥazaj sendependistoj.

Eksa Jugoslavio

27a. La islama bosnia loĝantaro de Bihaĉ-regiono proklamas sin aŭtonoma. Fondiĝis orient-bosnia respubliko.

28a. La bosnia registaro akceptas la UN-pacplanon por sia lando, la bosnia parlamento ĝin rifuzas.

Okcidenta Azio

13a. Israelo kaj PLO (Rabin kaj Arafat) en Vaŝingtono en ĉeesto de prezidanto Clinton kaj rusa ministro pri eksteraj aferoj, Kosirev, subskribas la reciprokan agnosko-kontrakton. La urbo Jeriĥo kaj la Gaza-strio ricevas politikan kaj ekonomian aŭtonomecon.

21a. Papo Johano Paŭlo 2a ak-

ceptas la israelajn ĉefrabenojn.

23a. Kneset, la jerusalema parlamento, akceptas la kontrakton inter Israelo kaj la palestinanoj.

23a. Jordanio alproksimiĝas al PLO kaj Bonno invitas Arafaton.

Orienta Eŭropo

5a. Papo Johano Paŭlo 2a vizitas Litovion, Latvion kaj Estonion. Ĉilasta akreditas ambasadoron en Vatikano.

19a. La parlamentaj elektoj en Pollando alportas venkon de la ekskomunistaj partioj. La dekstraj partioj de Suĥocka kaj Walesa kolektas malmultajn voĉojn.

Okcidenta Eŭropo

13a. La norvegajn parlamentajn balotojn revenkas la laborista partio de ĉefministrino Brundtland. Pro malreguleco dum la kalkulado, la balotoj devos esti ripetitaj.

16a. Kessler kaj Streletz, funkciuloj de eksa GDR, estas kondamnitaj je karceri puno. Ĝis ekvalido de la verdikto ili estas liberaj.

18a. Rumanio iĝas la 32a membro de la Eŭropa Konsilio.

21a. En Novjorko malfermiĝas la 48a ĝenerala kunveno de UN. La mondorganizaĵo staras sub la signo de militaj kaj financaj krizoj.

23a. En Montekarlo decidiĝas, ke la olimpikaj ludoj en la jaro 2000 okazos en Sidnejo (Aŭstralio).

Afriko

1a. La balotantoj de la Centrafrika Respubliko voĉdone forpelas sian prezidanton, generalon Kolingba. Tiu ĉi tamen rehabilitas eksdiktiston Bokassa; la nova prezidanto de Centrafriko nomiĝas Potasse.

5a. En Somalio denove pereas 7 UN-soldatoj. La UN-trupoj sin venĝas atakante somaliajn celojn.

Azio

13a. Laŭ informo de iraka opozicio en Irano, Sadam, iraka prezidanto, aŭguste preskaŭ pereis en atenco.

14a. La ostaĝoj el Germanio, Italio, Nov-Zelando kaj Svislando, kaptitaj aŭguste de kurdaĵ ribeluloj en orienta Turkio, liberiĝas.

29a. Öcalan, ĉefo de la kurda laborpartio, minacas per milita kampanjo kontraŭ Turkio.

30a. Fortega tertremo en Hindio postulas dekmilojn da viktimoj.

Ameriko

8a. En Kanado dissolviĝas la parlamento; elektoj okazos oktobron.

29a. Usono kaj Kubo interkonsentas la rehejmigon de 1500 ekzilkubanoj, nun en usonaj malliberejoj. Havano liberaligas la etmerkaton.

Andy KÜNZLI

SANO

Fonto de eterna juneco

Ekde miloj da jaroj tibetaj lamaoj praktikas kvin ritojn. Tiuj ritoj estas simplaj ekzercoj, sed ilia regula ĉiutaga praktikado estas ŝlosilo por eterna juneco, sano kaj vitala energio. Jen opinioj de homoj, kiuj regule praktikis la kvin ritojn:

– Post kvin semajnoj malrapide malaperas sulkoj sur mia vizaĝo. Malgraŭ tio, ke mi havas 40 jarojn, homoj taksas min nun kiel 35-, 29- aŭ eĉ 26-jarulinon. Post mallonga tempo oni povas reakiri belecon.

– Mi praktikis la kvin ritojn pli ol unu jaron kaj mia staturo pliboniĝis, mia korpo estas pli fleksebla kaj elasta.

– Kiam mi komencis praktiki ritojn, mi havis grizajn barbon kaj lipharojn kaj tiel palan haŭton. Nun mia haŭto akiris pli sanan koloron, la barbo kaj lipharoj malrapide nigriĝas. Krome mi legas etajn preslitterojn, kion mi ne povis fari pli frue. Dum miloj da jaroj mistikuloj de oriento opiniis, ke homa korpo havas sep precipajn energicentrojn, kiuj rilatas al sep glandoj. Hormonoj produktitaj de tiuj glandoj regulas ĉiujn funkciojn de la organismo. Lastaj medicinaj esploroj pruvis, ke eĉ la procezo de maljuniĝo estas regulata de la hormonoj. La energicentrojn oni povas imagi kiel vorticojn. En la sana korpo ĉiuj vorticoj moviĝas laŭ granda rapideco; pro tio vitala energio povas libere flui supren tra hormona sistemo. Sed se almenaŭ unu el la vorticoj malrapidigas rotacion, tiam la trafluo de vitala energio estas malfaciligita aŭ eĉ blokita. Tiel ĝuste oni povas priskribi maljuniĝon kaj malbonan sanstaton. La kvin ritoj restarigas ekvilibron en la sep energicentroj. Tio laŭvice kaŭzas, ke la ĉeloj reakiras la kapablon de reproduktado kaj kresko, kiun ili havis, dum organismo estis juna. Gvidas al tio kvin simplaj ekzercoj. Ĉiu aparta ekzerco estas efika, sed pleje tibetaj lamaoj nomas ilin „ritoj”.

Rito unua

Ekstaru rekte etendante la brakojn paralele kun planko manplatojn malsupren. Nun turniĝu ĉirkaŭ la akso. Gravas, ke vi turniĝu de maldekstro dekstren (laŭ la movo de horloĝmontriloj).



Rito dua

Kuŝiĝu surdorse, metu rektigitajn brakojn laŭlonge de la korpo, manplatojn al planko (fingroj kune). Levu la kapon, tiru la mentonon al torako. Samtempe levu rektigitajn gambojn ĝis la vertikala pozicio. Sekve mallevu malrapide la kapon kaj gambojn. Malstreĉu la muskolojn. Ĉi tie gravas spirado:


– profunda enspiro dum levo de la kapo kaj gamboj

– profunda elspiro dum mallevo de la kapo kaj gamboj.




Rito tria

Surgenuiĝu kaj rektigu la korpon. La manojn metu malantaŭe, sur la femuroj. Klinu la kapon kun kolo antaŭen; la mentonon tiru al la torako. Sekve deklinu la kapon kaj korpon malantaŭen, kiel eble plej malproksimen (enspiro). Revenu al komenca pozicio (elspiro).



Rito kvara



Eksidu sur planko kun rektigitaj gamboj; inter la du piedoj distanco ĉ. 25 cm. Metu la manojn surplanke, ĉe gluteoj. Tiru la mentonon al torako. Sekve deklinu la kapon kiel eble plej malantaŭen kaj samtempe levu la trunkon tiel, ke la genuoj estu fleksitaj kaj la brakoj restu rektaj. La trunko kaj femuroj devus esti paralelaj kun planko, la brakoj kaj kruroj vertikalaj al planko. En tiu pozicio streĉu ĉiujn muskolojn. Poste malstreĉu ilin kaj revenu al komenca po-



zicio. Ankaŭ ĉi tie gravas la spirado. Levante la trunkon profunde enspiro. Haltigu la spiradon dum streĉo de muskoloj. Revenante al la komenca pozicio klinante la kapon profunde elspiro.

Rito kvina

Apogu vin sur la manoj kaj piedfingroj. Inter la du manoj la distanco estu ĉ. 60 cm, same inter la du piedoj. Komencu de la pozicio, en kiu la brakoj estas vertikalaj al planko kaj la trunko kun gamboj „pendas” super la planko. Nun deklinu la kapon malantaŭen. Sekve fleksante la korpon ĉe la kokso faru pozicion similan al inversa litero V kaj tiru la mentonon al torako. Revenu al komenca pozicio. Spiro kiel antaŭe:



profunda enspiro dum levo de korpo, ekspiro dum mallevo.

Kiomfoje ekzerci ĉiun riton? La unuan semajnon – ĉiutage ekzercu ĉiun riton trifoje. Dum la dua semajno kvinfoje, dum la tria sepfoje; kaj dum ĉiu sekva semajno ĉiam pli je du ripetoj – ĝis vi atingos la nombron 21 (post dek semajnoj).

Antonina CIELECKA

Vojaĝado estas lia profesio

Antaŭ nelonge finiĝis internacia elefanto-ekspedicio en ĝangaloj de centra altebenaĵo de Vjet-Namo – regiono ĝis nun fermita por eksterlandanoj. Ĝin gvidis vojaĝanto kaj ĵurnalisto Jacek Palkeviĉ. Li estas konata en Eŭropo, Ameriko kaj en (eksa) Sovetio pro tio, ke li esploris i.a. sud-amerikajn sovaĝarbarojn, studis kulturon de popoloj de Nepalo kaj Borneo, kaj sen akvo kaj manĝaĵoj spertis varmegon de dezertoj en Meza Azio kaj malvarmegon de altaj latitudoj de rusia nordo.

„Nia celo”, diras Palkeviĉ pri la lasta ekspedicio en Vjet-Namo, „estis atentigi publikan opinion al sorto de elefantoj, kiuj nun estas sojle de formorto”. Fakuloj asertas, ke post kelkdeko da jaroj la lastaj elefantoj por ĉiam malaperos de nia planedo pro ekstermo de arbaroj kaj kontraŭleĝa ĉasado. La ekspedicio konatiĝis kun homoj malproksimaj de civilizo kaj preskaŭ nekonataj al scienco.

NikSt



Jacek Palkeviĉ, defendanto de la elefanto (foto: ITAR-TASS)

KUBO

Ŝtormo

Ne ofta fenomeno trafis Kubon en marto, kiam fortega malvarmofrondo trapasis la tutan insulon. La fronton akompanis ventegoj ĝis 168 km/h. En la okcidenta parto de la insulo

okazis inundoj, kiuj devigis al la instancoj evakui la loĝantaron de malaltaj, apudmaraj regionoj. Trafitaj estis konstruaĵoj kaj agrikulturo. En Havano difektiĝis familiaj loĝejoj (proksimume 12000) kaj ĉe la haveno estis detruitaj du utilaj kaj altvaloraj grupoj. Interrompiĝis dum pli ol 72 horoj en kelkaj kvartaloj gas- kaj elektro-servoj.

En kelkaj provincoj, plantejoj de banoj, tomatoj kaj tabako preskaŭ plene detruigis. Birdoj destinitaj por polnutrado mortis pro la ŝtormo.

Laŭ la unua statistikoj tri homoj perdis la vivon dum pluraj dekoj vundiĝis. Eĉ en la flughaveno de Havano kvin aviadiloj diversgrade difektiĝis pro la ventoblovo.

Tri tuneloj interligantaj diversajn kvartalojn de la ĉefurbo plenŝtopiĝis de akvo.

Ankoraŭ ne eblas precize detaligi ĉiujn perdojn, tamen oni taksas ilin altaj.

Juan Lázaro Besada TOLEDO

RUSIO


Senbrua pistolo

Rusaj inventistoj ĉiam estis geniaj kaj multe da inventaĵoj estis faritaj en kampo de armilaro kaj pormilitaj varoj – ja la (ĉiam-por-milit'-prepariĝanta) ŝtato tiucele ne avaris rimedojn. Ekzemple, senbrua armilaro, kiun oni produktis por siaj agentoj,

kreiĝis en plej sekreta apudmoskva esplorinstituto pri maŝinkonstruado CNIITM, kie oni projektis, testis kaj aprobis ĉiun rusan armilon (pafistan, artilerian, kontraŭaviadilan kaj aviadilan) de kalibro ĝis 45 mm. Certe inter la 47 specimenoj de armiloj, kiujn oni konstruis dum lastaj 20 jaroj, la senbrua armilo elstaras kiel unika.

Kontraste al tradicia senbruigo (alŝraŭbigo de senbruigilo kaj flamestingilo, kio signife plipezigas la armilon kaj malhelpas al ĝia rapida kaj subita uzado), fakuloj uzis principe alian aliron. Senbrua pistolo elekstere preskaŭ ne diferencas de Smaĝina-pistolo, kies kalibro estas 5,45 mm. Ĝi estas same malpeza (nur 680 g) kaj malgranda (lokiĝas sur manplato) sed ĝia kalibro estas jam 7,62 mm, kaj ĝi povas enteni 6 kartoĉojn. La samajn ecojn havas senbrujaj kaŝpafista fusilo kaj mitralo, ambaŭ 9mm-kalibraj. Ili estas fald-eblaj – ekzemple la fusilon oni povas malmunti kaj porti en speciala „diplomata” valizeto. Tutcerte la armilaron oni faris ne por ordinaraj bataltrupoj, por kiuj senbrueco ne estas bezonata. Sed dum esplorado aŭ dum agado malantaŭ la malamika fronto la kvalito estas nemalhav-ebla. Tiajn armilojn uzas ekzemple kontraŭteroristaj trupoj, paraŝutistoj, esploristoj kaj aliaj specialaj trupoj. Nuntempe la instituto, konstruinta la unikan armilaron, estas en profunda krizo kaj suferas pro manko de rimedoj: Ĝin forlasas la plej bonaj fakuloj kaj kvalifikitaj laboristoj. Tamen tio estas alia historio.

NikSt



Senbrua pistolo por la agentoj de la sekreta polico.

Sekso, ĉu dekadenca deko?

Antaŭ nelonge finiĝis plej grandskala enketo iam en Ĉinio. Oni konkludas danke al ĝi:

1. Tro frua enamiĝo okupas mezlernejanon, kio tre ĉagrenas la gepatrojn;
 2. Populariĝas antaŭgeedza sekskuniĝo: 16 % de la abortantoj estas fraŭlinoj, kaj 80 % de la gefraŭloj inter 24–28jaraj havas seksan vivon;
 3. Oftiĝas sekskuniĝoj negeedzaj. Pro tio kaŭziĝas 36 % de la familiaj konfliktoj, kaj 40 % de la divorcoj.
 4. Nekontenta seksvivo multiĝas, kune kun homoj kiuj divorcas pro neharmonia seksvivo;
 5. Seksatencoj rapide kreskas;
 6. Prostituado estas malpermesita, sed vane. Prostituado reaperis kun la politiko reforma kaj malferma, ekz. en 1987 oni arestis en Guagzhou 240oble pli da putinoj ol en 1979.
 7. Veneraj malsanoj kreskas je 300 % jare. Aidoso troviĝas en urbejoj kiaj Beijing kaj en okcidentaj provincoj;
 8. Pornografiaj presaĵoj videblas ĉie;
 9. Naskolimiga leĝo permesas al gedzoj naski nur unu idon. La ĉinoj kutime preferas filon por ne pereigi la familian genton, tial oni havigas al si filon per ĉiaj metodoj (ekzemple helpe de popola recepto). Nun en ĉinaj elementaj lernejoj kaj infanvartejoj, knabetoj evidente pli multiĝas ol knabinoj. Multaj gepatroj tre zorgas pri eventuala edzino por sia filo: la proporcio viro/virino en Ĉinio jam atingis 130:100, dum la monda proporcio estas 106:100.
 10. Malfacile funkcias naskolimigo inter kamparanoj. La vilaĝanoj devas havi filon malgraŭ kiu ajn puno.
- HAO Weining

SAMSEKSISMO

Malaperantaj gejoj

Nova enketo pri samseksemaj viroj vekas polemikon en Usono. La celo de la studaĵo estas enketi pri la nombro de viroj, kies seksa konduto povas altigi aidoso-riskon. Tamen la enketo montras, ke nur unu elcento de la 3321 enketitoj estas ekskluzive samseksemaj.

La studaĵo estigis apartan intereson, ĉar ĝuste tiam la usona parlamento, la kongreso, debatis la rajtojn de

gejoj militservi. Surbaze de la raporto Kinsey [Knzi] el 1948, oni ĝis nun supozis en Usono, ke 10 % de la viroj estas samseksemaj. La nova raporto ne nur renversas tiun ĝisnunan supozon sed ankaŭ povus influi la politikon de la lando: dum 10 % estas grava faktoro en balotado, neniu politikisto sendormiĝas pro nura unu elcento.

Laŭ la enketo, unu centono de la viroj inter 20 kaj 39 jaroj diris, ke ili sekse rilatis sole kun viroj dum la pasintaj 10 jaroj. Aliaj samtemaj enketoj en Francio, Britio, Kanado, Norvegio kaj Danio liveras similajn rezultojn.

Gvidantoj de la geja komunumo en Usono akre kritikis la raporton, opinante, ke multaj homoj nevolonte malkaŝas intimajn seksajn detalojn al nekonata enketisto, aparte ne en lando, kie samseksaj rilatoj estas kontraŭleĝaj en 24 ŝtatoj.

Finfine do restas duboj ambaŭflanke de la debato. Tamen ĉiuj konsentas, ke politikistoj kaj sciencistoj ankoraŭ malmulte scias pri la privataj amoraj kutimoj de usonanoj.

Jeralt T. VEIT

ITALIO

Enpapera vero

Ĵurnalisto. Nome, kiu taksas la veron la motivo mem de sia agado kaj de sia rolo socia. Tio ĉi almenaŭ laŭcele. Enpraktike, tia fundamenta principo ofte rompiĝas. Certe, la problemoj de la ĵurnalismo ne abrupte aperis ĝuste hodiaŭ. Jam centon da jaroj antaŭe Oscar Wilde [Oska Ŭajld] verkis: „Pasinteco la homojn oni subtenis al torturo per rado, nun al tiu per gazetaro. Ĉi tio nomiĝas progreso.” Nuntempe, tamen, la problemoj ŝajnas pli akriĝi.

Unua serioza problemo koncernas la tenton fare de la ĵurnalisto iom „pufi” la faktojn por impresi sur la legantoj: Estas la dezirego novaĵon akapari, publikigi iel ajn grandiozan kronikaĵon. Kaj tia tento ne apartenas nur al la tielnomataj skandalaj gazetoj. Dua problemo estas la senkondiĉa aniĝo al iu ideologio, tial ke la ĵurnalisto elektas la novaĵojn laŭ la „politika koloro” de sia presaĵo. Konfesis ekzemple fama ĵurnalisto: „Kvarfoje mi iris al Vjet-Namo dummilite kaj aranĝis artikolojn, kiuj tre plaĉis al italaj maldekstraj partioj (socialism-komunismaj); parte ĉar mi rakontis la veron pri la timeginda vjetnama gerilo, parte ĉar mi cenzuris min mem.”

Alia danĝero, tre aktuala, venas el la

gazetproprietuloj, tiuj malnombraj industriistoj kiuj posedas la plej gravajn publikigaĵojn. Ĉu kapablas iu ĵurnalisto ekzemple verki artikolojn kontraŭ firmo, kiu poluas, sed samtempe reklamas en lia ĵurnalo, aŭ eĉ ĝin posedas?

Ĝuste por venki tiajn tentojn kaj retoni dignecon al grava profesio, la estroj de la itala Ĵurnalista Ordeno pasintjule prezentis sian „Ĉarton de la ĵurnalistaj devoj”, frukto de longa kaj pasia laboro.

La dokumento rimarkas unue vicon da principoj, ekde la etiko de respondeco koncerne la civitanojn, tre supera al la etiko de intereso: principojn kiel la respekto de la personaj rajtoj, la valoro de la vero pri okazintaĵoj, la supozo de senkulpeco de iu ajn antaŭ la definitiva verdikto kondamna, la devigo pri profesia sekreto, la forlaso de privilegioj kaj favoroj...

El tiuj principoj ĝeneralaj fontas tuj poste praktikaj kaj teknikaj normoj: Ĵurnalisto ne preterlasu erojn esencajn el plena rekonstruo de la faktoj; Titoloj, fotoj, klarigoj ne distordu pri la enhavo de la artikoloj; Oni ne publikigu bildojn hororajn alude al personoj kronikcentraj, nek la nomojn de ties parencoj (escepte se temas pri la publika intereso); Sammaniere oni ne dissciigu la nomojn de neplenaĝuloj aŭ de viktimoj de seksa perforto; Nur singarde publikigu la identeco de la kunlaborantoj de justico. La „Ĉarto” plue petas la redakciojn aranĝi rimedojn taŭgajn por dialogi kun la legantoj, ekzemple rubrikojn por reagoj kaj korektoj al raportitaj noticoj. La korektoj, precipe, dissciigu kiel eble plej frue kaj emfaze.

„Ankaŭ ni ĵurnalisto povas nun memlaŭdiĝi pro ĉi tiu ĉarto, kiu instigas la redakciojn al pli granda profesia rigoreco”, substrekis iu estrarano. Kondiĉe ke – oni povas aldoni – la memlaŭdo baziĝu sur reala prizorgo. La dokumento efektive, kiel diris la prezidanto de la Ĵurnalista Ordeno, estas „fakto laŭmorale tre elstara”. Kaj, samkiel ĉiuj reguloj moralaj, la kreado de tiu ĉarto estas ja grava, sed tamen ne sufiĉas, se oni ĝin ne aplikos. Estas ĉi tia la malfacila, kuraĝa veto pri la italaj ĵurnalisto.

Gianfranco CAZZARO

Viajn kontribuojn por la rubriko „moderna vivo” sendu al:

Paul Gubbins
3 Arden Court
Mossley
Congleton, Cheshire
Britio CW12 3JH

FINNA HELPO

Foto-ekspozicio en Murmansk

Pri la detruado de arbaroj, sur la duoninsulo Kola, aŭdis jam en la komenco de la okdekaj jaroj la finnaj fotistoj Esko Männikö kaj Pekka Turunen. Ili tamen ne vizitis la regionon ĝis la jaro 1989, okaze de la loka Festivalo de la Paco. Ili sekve decidis rakonti per fotoj pri la suferoj de la norda naturo, montrante la mortantajn arbarojn kaj ankaŭ la vivon de la homoj, kiuj loĝas en tiu infero de natura katastrofo.

Demandinte sin pri la sentoj de la kamparano, vivanta en la ombro de uzinaj kamentuboj kaj pri la estontaj eblecoj rikolti fungojn kaj berojn en apudaj arbaroj, la du fotistoj vizitis la vilaĝeton Kovda ĉe la Blanka Maro. Tie fiŝkaptado kaj ĝuste la rikoltado de fungoj kaj beroj helpas vivteni la vilaĝetanojn dum la longa vintro. Almenaŭ tie la kultivitaj terpomoj estas pli sanigaj ol ĉe Kandalakŝa kun sia apuda alumina kombinato.

En Kuzomenj kaj Varzuga la vizitoj al fiŝkaptistaj entreprenoj konvinkis ilin pri kiom gravas kunekzistado de homo kaj naturo. Se pereos arbaroj kaj malpuriĝos riveroj, tiam mortos ankaŭ la homa komunumo.

Esko kaj Pekka esperis, ke la ekspozicio de iliaj fotoj, vizitebla de ĉiu murmanskano dum aprilo kaj majo 1993, inspiros la lokan loĝantaron aktivigi por savi kaj renovigi la unikan naturon de la duoninsulo. Kaj ne vane! Ĉar vizitis la ekspozicion kun intereso ne nur multaj murmanskanoj, sed ankaŭ gastoj el aliaj distriktoj.

Je la 26a de aprilo, tago de la katastrofo en Ĉernobil, en la arta muzeo kunvenis reprezentantoj de diversaj ekologiaj organizaĵoj, mezlernejoj kaj ordinaraj civitanoj. Post rigardado de la altkvalitaj koloraj fotoj, okazis konferenco. Oni diskutis pri Ĉernobil kaj ĝiaj postsekvoj, pri la apartaj problemoj de la duoninsulo, pri la nuklea danĝero entute kaj pri ekologiaj demandoj en Murmansk mem.

La ruslingva titolo de la ekspozicio, *Remont*, signifas „Riparado”. Ja defiego! Inter la multaj kontribuantoj elstaris la pensia profesia fotistino, Ljudmila Belozjorova. Ŝiaj fotoj montris plurajn konkretajn ekzemplojn de la problemoj de nia bela, sed sentema kaj vundebla naturo. Ŝi elokvente komentis siajn fotojn, esprimante



bedaŭron, ke ne partoprenis la konferencon iu ajn aŭtoritatulo, aŭ ŝtata aŭ instanca.

Interalie, ŝi rakontis pri siaj penoj punigi iun ŝarĝaŭtoŝoforon, kies malzorga manovrado rompis belan betulon apud ŝia hejmo. Registrinte ĉion per sia fotilo, ŝi kune kun najbaroj sukcesis gajni proceson en sia distrikto. La kulpigita ŝoforo, aldone al pagi monpunon, devis ĉi-printempon planti novan betulon.

Kaj ne unika estas ĉi tiu ekologia venko. Lastatempe la gazeto *Sovjetskij Murman*, organo de la instancoj kaj urba kaj regiona, sciigis en artikolo pri fenomeno ja malofta – la brulado de la rivero Srednaja, 150 metrojn laŭlonge de ĝia fluejo. Pri tio, ke kelkaj tunoj da brulaĵo eniris la riveron, kulpis loka milita trupo. Monpunon ne eĉ ili evitis, kaj kvin milionoj da rubloj ne estas bagatela sumo...

Pri la agado de la ekologia centro *Geja* rakontis G. Ĥoreva, estinta gvidantino de la lerneja grupo „Verda Branĉo”. Ŝi proponis al mezlernejan programon por nova studobjekto: „Riĉaĵoj de nia regiono kaj naturprotektado”. Reprezentanto de la regiona komitato pri ekologio, N. Mihajlov, informis pri la estigado de sistemo por aŭtomata kontrolado de radiado. La projekto ekfunkcios en 1995, kaj helpos pri ĝi najbaraj finnoj.

Oni forte esperas, ke la naturprotektaj fortoj unuiĝos, kaj ke aperos novaj aktivuloj, novaj batalantoj. Kuraĝigas, ke en Severomorsk jam aperis en mezlernejo 2 nova „Verda Branĉo”, kaj ke en Monĉegorsk renaskiĝis urba societo por naturprotektado. Aparte la ekspozicio de finnaj fotoj kontribuis al la pormedia agado.

Aleksas MASIUKAS

Desapontas la tetra

Kaj birdamantojn kaj birdĉasistojn ĉagrenas la neprosperado de tetroj en Norda Britio; pro la sama kaŭzo, sed el kontraŭaj vidpunktoj. En la erikejoj, kie vivas la birdoj, mankas sufiĉa nutraĵo, kaj krome la sezonaj kondiĉoj starigis problemojn. Tial la kovado de idoj estis tre malabunda. Multaj mortis pro manko de nutraĵo. Normale la ĉasistoj mortpafas ilin po miloj ĉiujare. Birdamantoj nun malĝojas ĉar la birdoj mortas nature. Ĉasistoj siavice malĝojas ĉar ili mem volus mortigi la birdojn.

Will GREEN

Senlima krueleco

En diversaj landoj estas organizataj bestbataloj: taŭrobataloj en Hispanio, kokbataloj en Belgio kaj norda Francio, urs-hundbataloj en Pakistano, ktp.

Blua Mond-ĉeno (Viséstr. 39, B-1170 Bruselo) strebas por malpermesigi tiajn batalojn. Ĝi petas i.a. de la pakistana registaro ke ĝi ĉesigu tiajn batalojn inter azia urso kaj du danĝeraj hundegoj. La urso apenaŭ kapablas defendi sin; ne nur ĝi estas ligita per kondukŝnurego, sed ĝi ankaŭ estas sendentigita kaj senungigita. La hundoj saltas sur ĝin kaj mordas ĝissange. Tiu kruela batalo daŭras ĝis kiam la urso estas vundegita, sed ne mortanta, por ke ĝi estu reuzebla por ontaj bataloj.

Se vi kontraŭas tiajn barbaraĵojn, sciigu vian indignon al la pakistana ambasado en via lando.

DAŬRIGO

Orda mondo kaosa

Fraktaloj

Laŭ la konvencioj de klasika geometrio, rekto havas unu dimension, ebena du, spaco tri. Sed la figuroj de Mandelbrot troviĝas ie inter tiuj dimensioj; iom pli ol rekto sed malpli ol ebena, kio esprimeblas nur per decimalaj nombroj, nombroj frakciaj. Speciale pro tio li decidis nomi ilin „fraktaloj” (angle *fractals*). Aparte, la matematikisto eltrovis iun novspecan aron – la „aron de Mandelbrot” – infinite kompleksan kiel antaŭe sed nun ankaŭ ŝanĝiĝeman. El ioma distanco la figuro prezentiĝas kiel speco de sidanta Budho, kuŝanta surflanke. La interno de la aro estas plene nigra, ĉirkaŭita de blanka halo, poste de profundaj bluoj kaj nigroj eksterzone (fig. 7). De proksime ŝajnas ke la formo de ĉiu elstaraĵo estas tute simila al la figuro entuta. Ankoraŭ pli detala observo de unu el la partetoj, tamen, montras bildon plene malsimilan: amason da filamentoj bukloj, hipokampo, etendiĝas per fadenoj kaj spiraloj. La pli grandigo de iu spiralo siavice montras parojn da spiraloj kunigitaj per maldikaj pontetoj, el kies mezo fontas du bukloj. En ties centro aliaj kvar bukloj aperas, ligitaj per kroma iom diferenca, en variado de la tuta aro. Je ĉiu sekvanta grandigo ŝajnas aperi la samaj objektoj, sed pli preciza kontrolo ĉiam montras diferencojn. Kaj tiu procezo ripetiĝas senfine.

Kvankam ĝi estas unu el la plej kompleksaj objektoj matematikaj, la aro de Mandelbrot originas el tute simpla funkcio, ripetata senfine per komputilo. Kiu funkcio? Nu $z = z^2 + c$. Per vortoj: prenu iun nombron, ĝin multipliku per si mem kaj al la rezulto aldonu la nombron ekan.

Fraktaloj blovis novan aeron en plurajn sciencajn disciplinojn. Ili ja permesas novan vidmanieron pri la




Fig. 9 „Okulo” kiu aperas pro grandigo de la figuro 8d.




Fig. 10 Miniatura „Ensemblo de Mandelbrot”, ligita al la entuta figuro per fadenaj pontetoj, laŭ la maniero de cerboĉeloj.




Fig.11 Kaoseco aperas en multaj naturaj sistemoj. Jen tute ordinara modelo el la ĉiutaga vivo: krano kies akvogutetoj akiras aliajn formojn laŭ la kvanto da ellasata likvaĵo.

fenomenoj kaj novan metodon por ilin esplori. Laŭ la tezo de la „fraktal-geometrio”, por kompreni multajn fenomenojn oni plu ne plejeble perfekte izolu ĝiajn elementojn, senrigarde la tuton aŭ rilatojn kun la tuteco, sed male enkalkulu la tutaĵon, la strukturon totalan, kiu ofte speguliĝas en siaj ĉiuj eroj, kiom ajn malgrandaj aŭ grandaj ili estas. Montriĝis tiel, ke povas esti nepre erare dividi iun fenomenon en partojn kaj koncentri sian atenton je nur kelkaj arbitre selektitaj elementoj, sen zorgi pri la cetero, pri la ĉirkaŭmondo. La fiziko pri tertremoj estas bona ekzemplo pri tio. Tertremo granda estas ekzakta kopio, laŭ pli vasta skalo, de unu malpli granda. Tiel ankaŭ pri nuboj: ilia karakteriza malreguleco ne

ŝanĝiĝas se oni rigardas ilin el malmultaj dekoj da metroj aŭ el centoj da kilometroj.

Sed eble la plej bela ekzemplo pri la vido ĝenerala troveblas en la anatomio de nia korpo. La angioj, de la aorto ĝis la kapilaroj plej etaj, disbranĉiĝas tute laŭ fraktala modelo: iliaj dividiĝoj estas ripetataj tre similmaniere laŭ ĉiu skalo de grandeco – aŭ pli ĝuste: de eteco. Sammaniere, la mukozo de nia digesta aparato prezentas ondumadojn ene de ondumadoj. Kaj ankaŭ la bronkaj disbranĉiĝoj de niaj pulmoj, nia urinkolekta aparato, la hepata galodukto, iuj korfibroj, kaj tiel plu. Ili ĉiuj havas strukturon fraktalan, senfinan ripetiĝon de la samaj formoj laŭ skalo ĉiam malpli granda.




Fig.12 Ĉi tiu „altiranto stranga” enbildigas la aranĝigon de tri populacioj de neŭronoj (nervoĉeloj).

Guto ŝtonon traboras

Sed iĝas tempo reveni al nia origina celo en la kadro de kaoso: la altirantoj strangaj. Kiu rilato ekzistas inter altirantoj kaj la Mandelbrot-figuro? Nu, ĉiu altiranto estas en si mem fraktalo: orbito en limigita spaco; tamen tia ke ĝi neniam ripetiĝas aŭ kruciĝas, infinite.

Kie sin kaŝas la altirantoj strangaj? Kie ajn en la universo, kaj ankaŭ en nia ĉiutaga vivo, kiel ekzemple la tute ordinara okazaĵo de gutanta krano. La el ĝi eskapantan akvon prezentas la figuro 11. Unuafaze, kiam la akvogutoj elvenas nur iom post iom, tre regule (11a), la gutoj prenas egalgrandan aspekton. La grafika bildo de tiu situacio estas lima kurbo, kiu ĉiam ripetiĝas idente. Se la fluado iom pli rapidas (11b), aperas fenomeno nomata „duobliĝo de la periodo”: en ĉiu ciklo aperas gutparoj, ofte diferencantaj laŭ dimensioj. La diagramo montras nun kurbon, kiu kruciĝas regule. Kaj se la akvo fluo ankoraŭ pli abundas, okazas plua duobliĝo de la periodo. Finfine en 11c, ĝuste antaŭ ol la fluado fariĝas konstanta ŝprucado, la moviĝo de la gutoj iĝas senorda, kaosa, kion la diagramo montras per senregula kurbo, lima, senfina: iu altiranto stranga en ĝi efikas.

Konata proverbo diras ke guto ŝtonon traboras. Nu, ĉi-rilate oni povas diri, ke la supra akvogutado certe traboris la tradician mondpercepton de sciencistoj, trudante al ili la sciencon pri kaoso. Kaj multaj fakoj profitis el tiu nova kompreno esplora.

En astronomio la studado pri la evoluo de globformaj stelamasoj, en kiuj centmiloj aŭ eĉ pli da steloj „kunsi-




Fig.13 Kelkaj historiaj aparatoj inventitaj por realigi la revon de „eterna moviĝado”, kiu bezonus nenium alporton de energio por resti funkcianta.

das” mirige dense, estis ege malfacila aŭ eĉ entute malebla, ĝuste pro la amaseco de tiuj objektoj. Jam la evoluado de sistemo el nur tri steloj, fakte estis malfacile kalkulebla kaj antaŭvidebla trans iu tro mallonga tempodaŭro. Prognozi la konduton kaj disvolviĝon de amasego el milionoj da steloj, reciproke sin influantaj, estis do sen espero. Sed nun la astronomo Michel Hénon aplikis kaosogeometrion al tiu problemo, arbitre supozante ke tia amasego posedas strukturon fraktalan. Tiukaze la amasoj restos similaj kaj la skalo ne gravas.

Liaj kalkuloj laŭ tiu vojo havigis efektive rezultaton, kaj ĝi estis tre surpriza: la amaskerno spertas gravitan implodon, kun moviĝoj rapide kreskantaj direkte al infinita denseco. Hodiaŭ tiu lia teorio bonkonatas per la nomo „gravit-termika implodo”.

Ene de la koro, ĉiu vivanta ĉelo kuntiriĝas aŭ dilatiĝas bonorde kun la aliaj ĉeloj ĉirkaŭ ĝi. Estas tamen okazoj, kiam ĉiu ĉelo etendiĝas kaj kuntiriĝas senorde rilate al la tuto, tiel ke la koro ne plu kapablas perfekte plenumi sian rolon kiel sangopumpilo. Tio estas la en medicino konata dariĝerega „fibrilacio”, kiu povas kondukti al morto. Kvankam multfoje farita, nekropsio de la fiaskinta organo ne sukcesis malkovri en ĝi iun histan difekton aŭ ian inflamon kiel kaŭzon de la kolapso. Pro tio la specialistoj pri kaoso vidas en fibrilacio aperon de situacio kaosa, en kiu la ĉeloj komencas obei al stranga altiranto, ĝis partopreno de ĉiuj kaj fine kolapso de la ĝenerala funkciado. Temas pri kaoso stabila: se ne intervenas iu ekstera forto, ĝi daŭros esti „altirata” ĝisfine. La interveno ĉi-kaze konsistos el forta elektra skuo, kies efiko povas restarigi normalan ritmon en la korbatado.

Aerolitoj estas ŝtonecaj korpoj kaptataj al nia tero el foraj regionoj de la spacego. Kaosfakuloj pensas pri gravitaj malstabilecoj neatenditaj, do kaosaj, por klarigi ties alvenon.

Infanaj malsanoj dissemiĝas tute kaprice. William Schaffer projektis por ili difuzmodelon, surbaze de strangaj altirantoj, kiu kapablas antaŭdiri distribuon tre varian laŭ la naturo de koncernaj malsanoj. Ekzemple varicelo devus montri variaĵojn regulajn en sia aperoritmio. Morbilo kontraŭe dissemiĝas tute hazarde, post jaro de granda epidemio sekvas subita malkresko, kaj poste de rekresko sed modera. La tiel faritaj prognozoj bone akordiĝas kun la realaj fluktuoj, kiuj al epidemiologo tradicia ŝajnis neklarigeblaj. Morbila difuziĝo fakte sekvas strangan altiranton kun fraktala dimensio de proksimume 2,5.

Nia tero posedas magnetan kampon, kiu direktas kompasan montrilon. Ĝi similas pro tio al grandega dinamo. De tempo al tempo, laŭ ne regulaj periodoj de jarmilionoj, tiu stranga dinamo ŝanĝas sian polusecon, inversigante la nordan kaj sudan polusojn, kaj post alia periodo denove. La kaosterio antaŭvidas „dinamefikojn” kun tempa evoluo kaosa.

Kaoso kaj ordo

„Konstruu radon el malpeza ligno kaj metu ĉirkaŭ ĝi malgrandajn tubojn kavajn, kun samdiametraj boroj; ĉi tiujn aranĝu egaldistance kaj preskaŭ orte al la rado. Plenigu ilin ĝismeze per hidrargo kaj akvo. La rado, tiel aranĝita, kiam metita sur akso, ektorniĝos sen ekstera interveno.” Per tiuj vortoj, eliritaj el traktaĵo pri astronomio fare de iu Bhaskara, hinda matematikisto de antaŭ 900 jaroj, naskiĝis la erao de aparatoj, kiuj celas efektiviĝi la tielnomatan „eternan moviĝon” (fig.13). De tiu

tempo ĝis hodiaŭ aperis sennombraj instalaĵoj de inventistoj, kiuj provis realigi tiun belan revon: irigi maŝinon sen bezono de (aldona) energio.

Envere, la leĝoj de fiziko ne permesas tian moviĝon senfinan. Eĉ maŝino plej perfekte konstruita, sen notinda perdo de energio pro frotado aŭ kontakto kun la ĉirkaŭaĵo, tamen iom post iom perdos el sia energio pro estigo de varmo, kiu perdiĝas ekstere; eĉ se tio povas eventuale daŭri longe. Finfine la maŝino estas nepre kondamnita al ekhalto. Precipe la fifama Dua Leĝo de Termodinamiko deklaras, ke la senorda moviĝado de molekuloj – kiu ja estas la esenco de temperaturo – nehaltigeble kreskas en nia universo, alidire ke ĉio pronecesse devas iĝi pli kaj pli malvarma, pli kaj pli senmova, kaj ke ĉiuj strukturoj eventuale devas disfali: estas la fenomeno de „entropio”. Tiu ĉi leĝo estas konfirmita multmaniere kaj multfoje. Tamen, iamaniere nia universo, dum ĝia „nehaltigebla” kurado al tiu antaŭdirita fina morto pro malvarmo kaj rigideco, iel sukcesas (re)krei varmon kaj (re)krei ordajn strukturojn. Ĝia ŝajna kaoso kaŝas en realo iun subnivelan ordon, ankoraŭ ne plene komprentatan aŭ determineblan. Oni nur konstatas, ke ĝia kaoseco, se direktata, spite ĉion kapablas produkti konstruaĵojn kaj vivipovon mirigajn.

La maksimon de Einstein, ke dio ne ludas per ĵetkuboj, kaj ke absoluta hazardeco do ne ekzistas en la universo, hodiaŭ eĉas alia fizikisto, Joseph Ford: „Dio ja kubludas en sia universo, sed liaj ludkuboj estas falsitaj. La ĉefa objektivo de nia aktuala scienco estu malkovri laŭ kiuj reguloj ili estas falsitaj, kaj kiamaniere ni mem povus utiligi ilin por niaj celoj.”

Gianfranco CAZZARO

AFRIKO

La regado de la ekonomia dependeco

Profesoro Mashaury [Maŝaŭri] Tambite de la Universitato de Kisanganio en Zairio, en sia kurso „Studo de Afrikaj Socioj” diris ke „la problemoj la plej timigaj kiujn spertis la afrikaj ŝtatoj rezultas de la kolonia trudo kaj poste de la luktadoj kaŭzitaj de la sendependeco”. Sed la problemoj kiujn nun spertas la afrikano rezultas de la fenomeno de modernigo, ĉar depost la eŭropa invado la afrikano perdis sian personecon kaj li ŝatas vivi kiel vivas blankulo.

Estis ĉirkaŭ la 14a jarcento kiam la eŭropanoj ekkonis la nigran Afrikon. Diego Cao [Kao] kiel unua eŭropa esploristo alvenis en Zairio en 1482, kiam li malkovris la enfluejon de la rivero Zairo. Laŭ priskribo de eŭropanoj la afrika ekonomio estis fermita, ekonomio de memprovizado, malracia ekonomio... Tiam, laŭ afrikaj intelektuloj, la afrikano ne havis nocion pri profito, riĉeco kaj ŝparego. Tiuj nocioj, kiuj konsistigas sian mizeron, alvenis kun la koloniigo: depost tiu tempo li iĝis avida serĉanto de profito, egoisto kaj sklavo de la ŝparego. Tiel li perdis sian memfidon.

Malgraŭ la multaj malbonfaroj de la blankaj kolonistoj, estus nejuste ne rekoni la bonfarojn. Ekzemple en Zairio, la belgaj koloniistoj ne nur detruis la zairian kulturon, sed estas danke al ili, ke la zairano lernis legi kaj skribi, ricevis bonajn vojojn, modernajn sanejojn, industriojn... Tamen multaj afrikaj verkistoj demandas sin ĉu ĉiuj tiuj aĵoj estis necesaj al la afrika vivo. Cetere, la strukturoj konstruitaj de la eŭropanoj nur profitis al la devenlandoj, ĉar la tuta ekonomia strukturo: havenoj, vojoj kaj industrioj, estis direktita al ekstero. Oni ne konstruis ligojn inter ĉiuj afrikaj provincoj.


Ankaŭ estus erare pensi ke la afrikano ne estis politike organizita. Laŭ Prof. Mashaury, „ekde la antikvo sur la tuta afrika kontinento troviĝis multaj reĝolandoj kaj imperioj kun diversaj gradoj de komplekseco kaj variaj konceptoj de politika potenco”. La premoj kiujn spertis tiuj politikaj strukturoj malstabiligis la afrikan ekonomion.

Tiu malstabileco permesis al la eŭropanoj instali sian sistemon ekonomian kiu farigis la afrikanon la sklavon de Eŭropo. En Zairio, tiu dependeco alprenas multajn formojn. Sur komerca kampo, Zairio por industria landoj estas provizanto de krudmaterialoj

mineralaj kaj agrikulturaj kaj konsistigas merkaton por produktoj finitaj (ekipaĵoj) kaj duonfinitaj devenantaj el Eŭropo kaj Ameriko. Sur financa kampo, Zairio dependas de fremda kapitalo. Multaj entreprenoj (Lever plantejoj, Madail, Bralima, B.A.T., Nogueira, Zairo Gulf...) estas filioj de amerikaj aŭ eŭropaj multnaciaj firmoj. Tra siaj investoj, tiuj firmoj havas grandajn profitojn, kiujn ili ofte reheimigas. Iliaj reinvestoj surloke restas do modestaj.

Tamen, multaj eŭropaj landoj akiris sian riĉecon sur la afrika tero. Verdire, Afriko estas granda ekonomia potenco nekonata. La procezoŝefo belgazaira informas, ke Belgio ŝuldas al Zairio preskaŭ du mil miliardoj da usonaj dolaroj, sed estas Belgio kiu postulas pagon de Zairio. Kia skandalo! Multaj homoj pensas ke la post-kolonia aŭtoritateco, la tiraneco, la kultura kaj socia elradikigeo kiuj rezultas de la perfortema enrudigo de la okcidenta civilizacio en la tradicia afrika socia estas la fundamento de la afrika subevoluo. La eŭropanoj eliris Afrikon, sed la koloniado daŭras. Al tiu situacio ankaŭ kontribuis la malsperdo de la afrikano, lia manko de patriotismo kaj lia serĉo de persona profito. En 1973 en Zairio prezidanto Mobutu publikigis leĝon laŭ kiu ĉiuj entreprenoj de eŭropanoj lokigitaj en Zairio iĝis zairiaj posedaĵoj. Tiu fenomeno nomiĝis „zairigo”. Dek jarojn poste, ĉiuj plagoj ŝajnis sin doni rendevuon en Zairio: inflacio, ŝuldoj, tribalismo, morto, murdo, malsano...

Hodiaŭ la afrikaj politikistoj petas al la malnovaj koloniistoj ekspluati siajn proprajn landojn por redukti la abomenan mizeron. Laŭ la katolikaj pastroj, gviditaj de Episkopo Laŭrenco Monsenguo [Monsengŭo], la naciaj bankoj, la duonŝtataj institutoj, kaj la tuto de ministerioj obeas al la politikaj ordonaj kaj funkcias kiel kaso de politika partio, metita je la dispono de privatuloj. La okcidentuloj bone konas la afrikajn partnerojn kun kiuj ili subskribis kontraktojn. Ili scias kie troviĝas la mono kiun ili donis kredite al Zairio. Estas nenormale kaj nejuste ke tiuj, kiuj organizis financon sistemon por sia propra avantaĝo, repostulas subŝtelitajn kapitalojn de tiu sama popolo kiu estis senproprigita kaj necesigas striktajn buĝetojn, el kiuj rezultas senĉese kreskanta malriĉeco. Kresk-



Internacia Mona Fonduso (IMF) prognozadas ioman pliboniĝon de monda konjunkturo. Grave kontribuas al tio precipe la dinamikaj aziaj landoj.

anta loĝantaro estas devigata suferi la pezon de kreditoj nericevitaj, de kiuj profitis aliaj.

En Afriko, Gorbaĉov, la rusa eks-prezidanto, estas konsiderata kiel patro de la demokratio, ĉar lia „perestrojko” alportis venkon de libereco. Sed kio okazos al la okcidentaj profitoj en demokrata Afriko? Laŭ Jacques Chirac [Ŝirák], eksa franca ĉefministro kaj kandidato por la prezidanteco, „demokratio estas lukso por Afriko”. Oni nun komprenas kial Mobutu, enkorpiĝo de la diktaturo, daŭras esti prezidanto de Zairio malgraŭ siaj eksceso.

La okcidentuloj estos devigataj konsideri la afrikanojn kiel partnerojn kun kiuj ili subskribu lojalajn kontraktojn, ĉar post diktaturaj jaroj Afriko aspiras al reĝimo en kiu regas justeco. Post 12 jaroj da respublikana regado en Usono, demokrato iĝis prezidanto de tiu lando: Bill Clinton [Klint'n]. Neniam prezidanta elekto en Usono tiom interesis la afrikanojn, precipe la zairanojn. Eble ekonomiaj kaj politikaj rilatoj kun Usono nun estos pli humanaj kaj lojalaj kaj usonanoj komprenos ke ankaŭ afrikanoj ŝatas bonan vivon, same kiel okcidentanoj.

En la nuna stadio Afriko ne havas alian eblecon ol flegi rilatojn kun okcidentaj partneroj. Ĝi bezonas financajn rimedojn, kiujn nur la okcidento kapablas prunti, sed ĝi ankaŭ zorgu ke tiuj kapitaloj estas uzataj nur por la profito de Afriko.

Ankaŭ necesas ke la konduto de la afrikano ŝanĝiĝu, ĉar multaj, post senproprigo de sia lando, investis sian monon en okcidento aŭ vivas en lukso importita el okcidento.

Zandandu Ntomono ZOLA

Kiam homo iĝas krokodilo

Laŭ la verkisto Zamenga Batukezanga¹ en Zairio: „la nigruloj loĝis en Mez-Oriento, en Mediteraneo kaj en tuta Afriko. Ne estas nur pro invadoj de araboj, ke la nigruloj el Mez-Oriento kaj Mediteraneo rifuĝis en Afrikon; ili estis eĉ elpelitaj el Afriko, ili foriris al Magrebo, trairante la dezerton al kio ili devas la savon, ĉar estas la dezerto kiu haltigis la progreson de la araboj. Se ne, ĉiuj nigruloj estus ekstermitaj kaj tuta Afriko estus hodiaŭ araba.”

Laŭ la historiistoj kaj antropologoj, la grupo bantua, originanta el Egipto, venis konsistigi la Kongan Reĝlandon sur la dekstra bordo de la rivero Zairo. Tiu grupo ne povis trairi la riveron. Ili migris malalten al Kalunga², de kie ili trairis la riveron. Parto de tiuj bantuoj rifuzis elmigri, preferante restadi en la regiono. Kiuj elmigris nomis ilin Banianguan,³ kaj ilia regiono iĝis Manianga.

Poste, Manianga iĝis radia centro. Reĝoj kaj imperiestroj tien sendis maljunajn regatojn por incigi al ĉiuj specoj de tekniko, kiun oni tie trovis. La blankuloj alvenis al Manianga kaj miris, ke tiu popolo jam sciis uzi metalojn, kiujn ili prilaboris admirinde bone. En sia tempo Henriko Morton Stanley, usonano, miris vidi por la unua fojo nigrulojn esprimante sin en kora kaj verdira lingvaĵo, ne havanta malvarmon en la okuloj. Laŭ profesoro Mahaniah⁴, tiu blankulo, sendita de la reĝo de Belgio, konsilis al eŭropanoj ne instrui la manianganojn. Ili riskus esti la unuaj instigintoj aŭ depositantoj de rajtoj sociaj, ekonomiaj kaj politikaj de nigruloj. Tial oni vidis, ke la kolonianoj kaj la regado de prezidento Mobutu ne sin okupis pri manianganoj. Malgraŭ tio, malgraŭ ke Manianga ne posedis vividonajn lernejojn, la unuaj zairiaj laikaj universitataj studentoj, la unua zairia rektoro, la fondinto de la unua eklezio aŭtentike afrika, kio forĝis la nigrulan konscion, la fondinto de unu el la partioj politikaj (Abako), kiuj liberigis la landon de la koloniado, venis de Manianga.

Laŭ Teofilo Nainga, kiu mem estas manianganano, loĝanta en Kinŝaso: „Kia ajn estas la loko kie li troviĝas, manianganano ĉiam estas ano de la elito, kiu kreas kaj transformas la medion kaj brilas per saĝa logiko.”

Manianga estas kojnumita al oriento,

al la nordo kaj okcidenta nordo per la Respubliko de Kongo, al la sudo per la Zairo-rivero. Oni diras preskaŭ la forgesita regiono. Tamen ĝi naskas multajn intelektulojn jare, sed preskaŭ ĉiuj elmigras en grandajn urbojn por serĉi bonajn vivkondiĉojn.

La pitoreskaj karakteroj de akvofalegoj de Manianga ĝin faras unu el la plej mirindaj en la mondo. La verkistoj, pentristoj, poetoj, fotistoj kiujn ĝi inspiras, kreas valorajn kaj ne taksoble valorajn verkojn. Longa veturado sur la rivero al Luozi, ĉefurbo de Manianga, forigas ĉiujn zorgojn. Tamen malmulte da turistoj ĝin konas.

La kaŭzoj de la morto en la konga socio kaj precipe en Manianga povas esti klasigitaj en du kategorioj: naturaj kaj nenormalaj kaŭzoj. La natura morto estas tio kio oni ne povas kontesti, ĉar ĝi estas la volo de Dio – Nzambi-Mpungu – kiu donas la vivon kaj kiu ĝin retiras, kiam li ŝatas. La nenormala morto estas ĉiuj mortoj ne naturaj, kaŭzitaj per envulto, sorĉarto, magio, venenoj, akcidentoj, fulmo kaj sinmortigo. Ankaŭ ne estas facile, ke manianganano kredus al la natura morto, ĉar li tre kredas al la sorĉarto.

La zaira rivero ekas en la provinco Ŝaba, en sud-oriento de Zairio. Ĝi trafluas ĉiujn provincojn, escepte de Kasai. Ĉie tie rivero enhavas multajn fiŝojn kaj tre belan pejzaĝon ĉirkaŭe. Ĝi estas granda riĉaĵo por Zairio.

Por maniangananoj, tiu rivero ne nur konsistigas feliĉon, sed ankaŭ malbonon, ĉar la rivero estas ankaŭ loko aŭ vilaĝo de sorĉistoj, kiuj sin manifestas sub la formo de krokodiloj.

Laŭ populara manianga opinio, iuj personoj sin transformas en krokodilojn por mortigi siajn familianojn. Verdire, oni trovas multajn krokodilojn en la rivero Zairo. Kaj ĉiujare, kiam la rivero estas en leviĝo, unu aŭ du personoj mortas pro atako de krokodilo. Tiu ĉi atakas dum la persono sin lavas en la rivero, tie provizas sin per akvo, aŭ veturas en pirogo. El la tuta rivero nur en Manianga krokodiloj tiel atakas homojn. Ĉu ili do estas malsamaj al krokodiloj en aliaj regionoj? Pro la timo pri sorĉistoj aŭ pro manko de iloj, la maniangananoj sin sentas en tiu rilato senpovaj.

En la progreso de la memkonscio de maniangananoj, tiu timo foriras kaj la anoj ekis mortigi la krokodilojn. Tio

forte faris sinjoro Batangu, kiu ekstermis multajn el ili per modernaj armiloj. Sed ofte, kiam krokodilo mortas, ankaŭ iu persono mortas, ofte maljunuloj en Luozi pro mistera morto. Sed ne ĉiuj krokodiloj manĝas homojn. Ĉu oni do devas mortigi ĉiujn? Tamen estas landoj en la mondo, kiuj protektas sian faŭnon kaj ili faras turisman allogaĵon el la krokodiloj. Sed kion fari, se la krokodiloj mortigas homojn? La sorĉarto, se ĝi reale ekzistas, estas la plej granda honto de maniangananoj. Ilia nigra magio bremsas ja la ekonomian disvolvon de ilia lando. Feliĉe ke modernaj loĝantoj komencas eliri el tiu koncepto.

Certe, la manianganano popolo estas brava kaj laborema. Cetere, vizitantoj estas ofte surprizitaj vidi la modernan progreson de iliaj vilaĝoj. Se ili estus provizataj per akvo kaj elektro, diras Zamenga, la manianganaj vilaĝoj ne estas malsamaj al eŭropaj vilaĝoj. Sed, ĉar Manianga estas forlasita al sia sorto, sen tiaj modernaj ekipaĵoj, la popolo ĉiam sentas sin senpova kaj la krokodiloj daŭrigas senpune mortigi homojn. Necesus do modernaj kondiĉoj, permesante al la popolo havi akvon proksime al siaj domoj, sen bezoni serĉi ĝin en la rivero, modernaj maŝinoj por prizorgi la persikarbojn, veturiloj por facile transporti varojn kaj homojn alimaniere ol per la rivero. Ankaŭ ponto super Zairo ebligas pli oportunan kontakton kun la ĉirkaŭaj urboj. Sed kie la maniangananoj ĉion tion akiros?

Eble, se Zairio adoptus la nunan konstitucion, kiu parolas pri ekonomia liberalismo, kaj permesus al alilandanoj investi ĉie kie ili ŝatas, sur tiu ĉi tre produktiva tero kun siaj multaj kaj diversaj minaĵoj. Laŭ Zamenga, imito de la regiono de Inga, kiu situas nur kelke da kilometroj for, kaj kiu liveras elektron danke al la rivero, povus iom post iom transformi la manianganano regionon en iun Los Angeles de Zairio...

Zandandu Ntomono ZOLA

1. En sia libro „Luozi post 30 jaroj”.
2. La nomo Kalunga devenas, en la lingvo de tiu grupo, el la verbo *lunga* aŭ *nunga*, kiu signifas „venki”.
3. De la verbo *niangua*, kiu signifas „forlasi”.

La araba

عربي



La araba estas la lingvo ĉe la centro de la mondo, parolata de ĉirkaŭ 187 milionoj en Afriko, Azio kaj Eŭropo. Ĝi etendiĝas de Irako en la oriento ĝis Maroko en la plej fora okcidento (kiel signifas ties nomo arabe). Kiel la sankta lingvo de Islamo, ĝi estas influa en eĉ pli granda ĉirkaŭa regiono kie oni parolas aliajn lingvojn – centra Azio, la hinda subkontinento, Irano, Turkio kaj granda parto de Afriko – kaj en sud-orient-Azio. Kvankam la origino estis en la araba duoninsulo, ĝi disvastiĝis tra tia granda areo en nekredeble rapida tempodaŭro tuj post la deklaro de Islamo en la 7a jc. pK.

Ĝi estas semida lingvo, tre proksima al la hebrea, kiel montras la kutimaj arabaj kaj hebreaj salutoj *salaam* kaj *šalom*. (Ambaŭ signifas pacon. Espereble iun tagon ili povos praktiki tiun deziron unu al la alia!)

Antaŭ ĉio necesas difini, kion signifas „la araba”. La lingvo de la nomadaj tribanoj transformiĝis al unu el la plej civilizaj paroliloj per nur unu verko – la korano, por islamanoj la vortoj de Alaho liveritaj tra lia profeto Mohamedo. Pro tio, oni ne traduku ĝin, saĝa postulo, ĉar ĝian belecon poezian oni ne povas transigi al alia lingvo. Pro la superrega influo de la korano, ties speco de lingvaĵo iĝis, kaj restas, la sola respektbla por araboj.

Sed la parola lingvo ne estis pli rezista al homa ŝanĝo ol aliaj lingvoj.

Hodiaŭ oni parolas tre malsame, jen en la diversaj arabaj landoj, jen en la klasika lingvo. Fakte la variaĵoj en norda Afriko ekzemple, kvankam ĉiuj nomiĝas „araba”, estas proksimume tiel disaj kiel la latinidaj lingvoj (portugala, hispana, franca, itala, k.a.) norde de Mediteraneo. Sed ilia prestiĝo estas tiel malalta, ke oni preskaŭ neniam skribas ilin, kaj parolanto provos malinstigi vin lerni konversacian lingvon! Anstataŭe, por paroli al eksterlandano (araba aŭ alia), en la komunikiloj, kaj en literaturo, oni utiligas specon de la klasika lingvo, iom vastigita vortare kaj pli simpligita gramatike („la moderna norma araba”). Tiu konsidero nur de la skriba lingvo kiel inda similas al la situacio en Ĉinio, kaj kiel ni vidos, la karaktero de araba, kiel ĉina, skribo, favoras la unuiĝon de la kulturo malgraŭ parola diseco. Tamen oni sin demandu ĉu venos la tempo, kiam ankaŭ la araboj fine devos agnoski la vivorajton de siaj naciaj lingvoj, kiel okazis por la latinidaj lingvoj dum la mezepoko, kaj altigi la klasikan lingvon al neŝanĝebla, beletra kaj religia lingvo, kiel okazis al la latina. Nuntempe estas malfacile prezenti normalan konversacion en skribo.

Kiel aliaj semidaj lingvoj, ekz-e la hebrea kaj malta, la araba havas tre distingan vortstrukturon. Vortoj havas proprajn teoriajn „radikojn” de plej ofte tri konsonantoj en fiksita

ordo. Oni derivas aliajn parolelementojn kaj parencajn vortojn de ili, ŝanĝante la apudajn vokalojn, kaj/aŭ aldonante prefiksojn aŭ sufiksojn. Ekzemple la radiko *K-T-B* enhavas ĝeneralan ideon de skribo; ĝia plej simpla fakta formo *KaTaB* (كتب) signifas „li skribis”. Variigante la vokalojn, ni trovas *jaKTuB* (li skribas), *KiTaaB* (libro), *KuTuB* (libroj), *KiTaaBa* (skribo), *KaaTiB* (skribanto), *maKTaB* (oficejo), *maKTaBa* (librejo), *muKaa-TaBa* (korespondado), ktp. Tiuj formacioj estas granda helpo por antaŭdiri la signifon de nekonataj vortoj. Kiel ni vidos, la skribsistemo igas, ke oni ofte devas diveni konatajn vortojn. Bedaŭrinde, la radika sistemo ne estas tute tiel perfekta, ke oni povas krei proprajn vortojn laŭ la modelo.

Parenteze, oni estas tentata demandi sin, ĉu la karaktero de la arabaj konsonantaj radikoj kaj alfabeto kontribuis al la grandegaj paŝoj de la klasikaj arabaj matematikistoj en algebro (mem elaraba vorto), en kiu oni ankaŭ devas trakti konatajn kaj nekonatajn erojn?

Araba gramatiko estas sufiĉe komplika, aparte en la klasika speco; la verboj estas aparte malfacilaj. Ekzistas du arbitraj genroj, vira kaj ina (kies kutima parola finaĵo estas *-a*, kiel en malparencaj eŭropaj lingvoj) – ili tuŝas eĉ verbfinalojn. La pluraloj de substantivoj ĉefe ne estas antaŭdireblaj. Iuj formiĝas aldonante su-

fikson, aliaj (kiel *kitaab/kutub*) per interna ŝanĝo en la vorto (kiel angla *goose/geese*, ansero(j)). En la klasika araba ankaŭ ekzistas (pli simpla) 'duala' formo, por esprimi duon da io. Substantivoj havas tri kazojn, nominativan, genitivan kaj (nur skribe) akuzativan.

Adjektivoj estas por araboj en la sama kategorio kiel substantivoj. Kiel ĉi tiuj, ili devas akordiĝi laŭ genro, difineco („la”) kaj plej ofte, nombro. Ili venas post la substantivo (sed en serio oni povas malcerti, al kiu ili aludas). Posedon oni montras uzante la egalvaloron de, ekz-e, „titolo la-libro” por „la titolo de la libro”.

Unu el la plej konataj arabaj vortoj estas la difina artikolo *al* (la), kies / ofte asimiliĝas kun la unua konsonanto de la sekva vorto. Ĝi estas tiom parto de tiu ĉi, ke ĝi travivas en multaj pruntvortoj en aliaj lingvoj, kiel en alkoholo, alkemio, almanako, alkalo, alkovo. Kiel Esperanto, la araba ne havas nedifinan artikolon.

Ne ekzistas verbo „havi”. Samkiel en la rusa oni diras la egalvaloron de „kun (aŭ al) mi estas libro”. Simile „esti” uziĝas en parolo pri la pasinteco, sed ne pri la nuntempo. Anstataŭ verbotempojn, la araba utiligas perfektivan kaj imperfektivan formojn, kiel faras la hebrea.

La uzado de la numeroj estas alia malfacila eco de la araba. Interese, kvankam la skribo fluas de dekstro al maldekstro, la numeraloj iras en la sama direkto kiel niaj, t.e. kun la pli grandaj numeraloj maldekstre. Eble tio estas ĉar la araboj pruntis la dekuman sistemon de la hindoj, kiuj skribas dekstren; aŭ eble ĉar la parolaj arabaj numeroj ankaŭ komenciĝas per la plej malgranda nombro.

La klasika araba posedis nur tri vokalojn: *a*, *i*, *u* (longajn kaj mallongajn), kvankam la modernaj dialektoj posedas multajn pli. Kontraŭe, la konsonantsistemo havas plurajn nekutimajn, malfacile lerneblajn, kaj apenaŭ apartigeblajn sonojn.

La araba skribo eble estas la plej bela en la mondo, ĉu en manuskripto, ĉu en arĥitektura dekoracio. Estas vera plezuro skribi en ĝi. La skribo estas kursiva, eĉ kiam presita. Unu komplikaĵo, kiu tamen kontribuas al ĝia bela aspekto, estas ke ĉiu litero havas de du ĝis kvar formojn, laŭ sia pozicio en vorto – komenca, meza, fina aŭ memstara (Ne ĉiu litero rajtas kuniĝi ambaŭflanke kun aliaj.) Fakte ĝi similas al stenografio, kaj eblas skribi ĝin tre rapide. Sed frue leviĝis la problemo de ĉiuj kursivaj kaj stenografiaj skriboj, ke la literoj facile kunfandiĝas; la araba solvo estis meti super aŭ sub ili

punktojn por apartigi tiujn, kiuj sen tio iĝus samaj. Alia trajto de stenografio estas, ke oni skribas nur la minimumon necesan por kompreno. La plej elstara eco de la araba skribo estas, ke oni ne skribas mallongajn vokalojn. Tiu manko de skribitaj vokaloj fontas en la origina semida alfabeto (la unua laŭ nia scio), kaj troviĝas ankaŭ en la hebrea. Poste, la semidaj popoloj trovis neceson marki la longajn vokalojn (la araboj utiligas siajn literojn por *j*, *ŭ*, *'* ankaŭ por *ii*, *uu*, *aa*), sed kvankam ili evoluigis sistemon de streketoj por la mallongaj vokaloj, ili kutimas uzi ilin nur en la korano kaj en infanaj lernolibroj.

Krom la simpla vokalsistemo de la klasika araba, estas la konsonantaj radikoj de semidaj vortoj, kio ebligas tian konsonantan skribon. Pro ĝiaj konataj formacioj, oni devas scii, kiujn vokalojn ĝi devus havi.

Almenaŭ denaska parolanto devus scii tion. Eksterlanda lernanto trovas en ĉi tiu rilato grandan malfacilon. Eĉ por arabo, la skribo ne estas maldusenca, kaj legado estas (rapida) konjektoludo. Ekzemple la vortoj *katab* kaj *kutub*, donitaj supre, skribiĝas same; ankaŭ *aaĥir* (fina) kaj *aaĥar* (alia). Oni devas decidi laŭ la kunteksto, por povi disigi ankaŭ la plej multajn formojn aktivajn kaj pasivajn. Do, kvankam ĝi evidente estas adekvata por skribi la araban, ĝi ne estas ideala skribo eĉ por ĝi. Multajn aliajn (nesemidajn) lingvojn oni sukcesis skribi per ĝi, sed por tiuj kun pli gravaj kaj nombraj vokaloj ol la araba, kiel en la svahila, malaja kaj turka, ŝanĝo al vokala alfabeto (romia) montriĝis pli oportuna.

Unu avantaĝo de konsonanta skribo estas, ke en lingvoj ĝenerale, vokaloj tendencas ŝanĝiĝi multe tra spaco (dialektoj) kaj tempo (historio), dum konsonantoj restas pli stabilaj. Ĉar ĝi emfazas la konsonantan skeleton, la antikva araba restas komprenebla hodiaŭ, kaj ĝi estas uzebla de araboj ĉiuregionaj malgraŭ siaj disaj dialektoj – do simila situacio kiel en Ĉinio. La araba ne estas tre facile lernebla lingvo (krom por hebrepalantoj), pro ĝia komplika sed aminda alfabeto. Ankaŭ ĝia vortaro estos fremda al la pli multaj studentoj (ĝi ne multe favoras pruntvortojn), kvankam alilingvaj islamanoj rekonos multajn vortojn, kiujn alprenis la propraj lingvoj de la araba. Sed ĝi estas fascina lingvo kaj ĝia studo malfermas unu el niaj plej riĉaj civilizoj, kaj unu el la plej parolataj kaj kreskantaj mondlingvoj.

Bradley KENDAL

GAELA

Esperanto-vortaroj

Legantoj certe konsentos, ke granda manko rilate al la lingvo en kiu estas redaktata nia magazino, estas la serioza malabundo da vortaroj Esperanto-nacilingvaj. En kelkaj lingvaj familioj, ili tute malekzistas. Kelkaj etaj vortaroj por keltlingvanoj estas haveblaj, sed en la gaela lingvo – unua oficiala idiomo de la Irlanda Respubliko kaj grava minoritata lingvo en Skotlando – troviĝis ĝis nun nur malgrandaj vortlistoj kun bazaj esperantaj vortoj.

Gael-parolantaj esperantistoj nun klopodas havigi al la publiko taŭgajn vortarojn. Baldaŭ aperos esperantairlandgaela-esperanta vortaro, kompilata de Breandán 'O Mearáin, kaj jam aperis eksperimenta „Vortaro gaela/esperanta/gaela” de Hugh Martin, akirebla ĉe la Esperanto-Asocio de Britio (140 Holland Park Avenue, Londono W11 4UF) por 6 pundoj plus afranko. Temas pri la skota gaela lingvo. GMA

MATEMATIKO

Nova gaela numeralo sistema

La monata fakrevuo *Gluais* („Gloso”) en la gaela, temanta pri leksikografio kaj vortaroj, eldonata en Belfasto, Nord-Irlando, kutime publikigas artikolojn en la du ĉefaj variantoj de tiu kelta lingvo, nome irlanda kaj skotgaela. Ĝi iom unike kvazaŭ traktas la du idiomojn kiel unu lingvon. Tio multe vastigas la kampon de gaela filologio, kaj firme enkadrigas tiun neglektitan lingvon en la ĝeneralan eŭropan kulturon.

Gluais antaŭ nelonge havis interesan artikolon pri nova numeralo sistema por la skotgaela lingvo. La parolataj keltaj lingvoj uzas, en numerado post dek naŭ, ne la decimalan sistemon, sed la pli antikvan bazitan sur la nombro dudek. Spuroj de tiu malnova sistemo troviĝas ankoraŭ en kelkaj nekeltaj eŭropaj lingvoj, ekzemple en la franca kaj dana, kaj en biblia angla.

Dudeksistema kalkulado estigas ege longajn kaj komplikajn nombrojn: 77 iĝas „tri dudekoj kaj dek sep”, 283 iĝas „ducent kvar dudekoj kaj tri”. Grandaj ordaj numeraloj estas eĉ pli timigaj; ekzemple 149a fariĝas en gaela „la naŭa post la sep dudekoj”, kaj tiel plu. Lernejoj ofte trovas

tiajn numeralojn tre malfacilaj, precipe en aritmetika kalkulado.

Ekde longe en Irlando oni uzadas en la lernejoj, kaj ĉie en la normala vivo, multe pli facilan decimalan sistemon, similan al tiuj de la greka kaj de la latinidaj lingvoj. En 1914, estis proponita al la Gaela Akademio en Skotlando, similan decimalan sistemon, sed ĝi neniam estis akceptita. Nun la skotaj edukadaj instancoj enkondukas sistemon, kiu estas kvazaŭ kompromiso inter tiu el 1914 kaj la moderna irlanda. Pluraj skotaj verkistoj kaj aliaj uzantoj kontraŭstaras la enkondukon de tiu ĉi nova metodo, sed edukistoj argumentas, ke la antikva ne plu taŭgas por instrui matematikon en komputila epoko. Tamen, en la parolata lingvo, kaj en nematematikaj situacioj kaj kunteksto, uziĝas la tradicia sistemo. Garbhan MACAOIDH

LA ARAGONA

Ĉu mortonta lingvo?

Hispanio agnoskis sian plurlingvecon en la demokratia konstitucio de 1977. Ĝi kreis ŝtaton dividitan je 16 aŭtonomaj komunumoj, kiuj en siaj statutoj povas kunoficialigi lingvojn en siaj teritorioj. Tiamaniere la galega, la eŭska kaj la kataluna fariĝis oficialaj apud la hispana en difinitaj komunumoj: Galegio (pri la galega), Eŭskio kaj Nafaro (eŭska), Katalunio, Valencilando kaj Balearoj (kataluna).

Aragono estas regiono en la nordo de Hispanio, limanta Okcitanion, inter Nafaro kaj Katalunio. Ĝia ĉefurbo estas Zaragoza. Kvankam la hispana estas oficiale sola agnoskita lingvo, kunvivas en la regiono du kromaj lingvoj: la kataluna kaj la aragona. Jen la malsukcesa historio de la aragona.

Koncize, Iberio estis invadita en 711 fare de islamanoj, kiuj transiris la markolon de Ĝibraltaro kaj fulme konkeris la tutan duoninsulon. Post jarcento ekaperis en la nordo la unuaj ĝermoj de postaj sendependaj kristanaj regnoj, kiuj dum pliaj sep jarcentoj konkeradis la sudajn arabiĝintajn regionojn, disvastigante siajn religion, lingvojn kaj morojn. Tiuj lingvoj estis (de okcidento orienten): la galega (praportugala), la astura, la kastilia (t.n. hispana), la eŭska, la aragona kaj la kataluna.

La aragonaj graflandoj naskiĝis meze de Pireneoj. Tie evoluadis latinida lingvo, frata de la apudaj kataluna, okcitanaj kaj kastilia. Per la unuiĝo de la graflandoj kaj ilia ekspansio suden kreiĝis la Aragona Reĝlando. La lingvo de la nordaj valoj altrudiĝis al la lo-



ĝantoj de la Ebro-regiono. Iam, en la 12a jarcento, Aragono konfederaciĝis al Katalunio per persona unio, kaj la suda plivastigo rapidiĝis. Ĝi kulminis ĉ. 1250 per la konkero de la mauraj regnoj de Valencio kaj Murcio.

Ĝis tie ĉi la historio de la aragona tute similas tiun de la ceteraj latinidaj lingvoj de la ibera duoninsulo. Ĝi tamen iom post iom eksinkis pro diversaj kaŭzoj. La aragona fariĝis administracia lingvo nur malfrue, dum la kataluna dinastio (12-15 jc.). La kortego tamen situis en Barcelono, en Katalunio, kaj tio malprestiĝigis la aragonan rilate al la kataluna. Eble tial mezepoka aragonlingva literaturo apenaŭ ekzistas: la homoj prefere uzis la latinan, katalunan aŭ eĉ kastilian. Fakte la uzo de la kastilia estas kurioza, ĉar ĝi estis tute fremda por aragonanoj, sed oni devas ĝin kompreni per la tiutempa emo al arta esprimado en proksima sed fremda lingvo: kastilianoj, ekzemple, versis galege, dum katalunoj trubaduris okcitane.

Kredeble tiu malprestiĝo igis retroiradi la aragonan. Unue ĝi malaperis el la teritorioj ekster la reĝlando: en Rioja (11-13a jc.) kaj Nafaro (14-15a jc.). Post la surtroniĝo de kastilia dinastio (15a jc.) kaj la konfederaciĝo kun Kastilio (15a jc.) komenciĝis la kastiligo de la aragonlingvaj regionoj en Valencilando kaj Aragono. Nobeloj kaj burĝaro forlasis sian lingvon, jam ekde la 15a kaj la limregionoj iom post iom translingviĝis. Tiel ekimpetis duobla nehaltigebla procezo: la urboj kastiliĝis kaj ondo el la sudo kaj okcidento generacion post generacio falĉadis la aragonlingvan teritorion. Kompreneble postrestaĵoj de la aragona abundas: leksiko kaj prozodio tre karakterizas la nuntempajn kastiliajn dialektojn en suda Nafaro, okcidenta Valencilando kaj Aragono.

Estis ne antaŭvideble, ke en tia situacio la aragona postvivis ĝis hodiaŭ. Ĝi ja agonias denove reduktita al valoj, kie ĝi naskiĝis antaŭ pli ol mil jaroj. Oni kalkulas, ke ankoraŭ ĉirkaŭ

30 000 homoj parolas ĝin. Kompreneble, ili ofte maljunas. La aragona ne estas agnoskita; ĝin ignoras lernejoj, televido, radio kaj gazetaro. Ekzistas nur manpleno da societaj revuoj kaj ĉiujare oni eldonas en ĝi 4 aŭ 5 librojn. Klubejaj kursoj okazas ie-tie.

La poraragona movado, al kiu oni ŝuldas tiujn strebojn dignigi la aragonan, ekaktivis komence de la sepdekaj jaroj de nia jarcento. Tiam oni determinis ĝian ortografion kaj transdialektan normlingvon. Komenciĝis moderna literatura aktivado. Organizigi kursojn, per kiuj junuloj reakiras la lingvon de siaj geavoj, kaj foje ekuzas ĝin familie. Kaj oni klopodas akiri de la aŭtonoma registaro la oficialigon de la aragona lingvo. Nuntempe la Aragona Parlamento diskutas reformon de la statuto, kiu povus ĝin enkonduki. Sed malgraŭ tiu ebla oficialigo la aragona povas morti. La ekzemplo de la irlanda bone pravas, ke registara subteno ne sufiĉas, por ke lingvo plene revigliĝu. Tamen ĉiu homo rajtas vivi en sia lingvo, des pli se li aŭ ŝi loĝas en sia prapatrujo.

Hektor ALOS i FONT

Postskribo

Jen en aragona lingvo parto el la *Cuento de la lechera* („Rakonto pri la laktovendistino”), prenita el la lingvistika kompilaĵo *Las lenguas de España* („La lingvoj de Hispanio”).

I cuan ya s'en iba su tío, le ba dí la moceta: „Compre-me una craba pa yo, que m'en iré a bendé la leche a Gráus”. Y su tío la iba comprá el día que s'en iba.

I como la moceta iba dicho en casa: „m'en irá a bendé la leche a Gráus”, ban pensá su paere i agüelo: „la de to las crabas podría í a bendé esta moceta; nos tocarían bienes dinés”. I la moceta ba dí entonces: „I a yo, que me darán de llebá la í?” (Red.)

Kaj la suno haltis...

Kiam Immanuel Velikovski, rus- kaj jud-devena usona psikiatro, poligloto, ekzegezisto, k.a., lanĉis en 1950 sian verkon *Worlds in Collision*, li vekis grandan intereson ĉe la ĝenerala publiko kaj grandan polemikon ĉe la sciencistaro. Temis pri tezo, ke la katastrofaj naturfenomenoj lige kun la elmigro de la hebrea gento el Egiptio – priskribitaj en la Biblio – ne estas nur fantaziaĵoj, sed historiaj eventoj kaŭzitaj de kosma perturbo. Hodiaŭ, post kvardek jaroj, nia senkompara André Cherpillod resumas kaj revivigas tiun polemikon komentante la tezon kaj aldonante al ĝi el siaj propraj grandaj lerto kaj sperto sur la tereno de antikvaj lingvoj kaj antikvaj skribaĵoj. Li ankaŭ sukcesas mem reprodukti la originalajn terminojn kaj skribsimbolojn per speciala komputila programo. Kelkaj klaraj skizoj trafe ilustras la kosmajn situaciojn, sur kiuj baziĝas lia tez(ar)o. Multnombraj legendoj kaj tradicioj de multaj popoloj tra la mondo indikas, aŭ ŝajnas indiki, ke la planedo Venuso subite aperis en la ĉielo dum la homa historio, kaj sekve estus iel-tiel la granda „kulpulo” pri ĉiuj aluditaj katastrofoj. Tamen, precize tiu ĉi astronomia fundamento de la disputata demando estas kaj restas la malforta aĥila tendeno, kiu decidas inter fantazio kaj teorio, same ĉe ambaŭ aŭtoroj. Por Velikovski la „vualita planedo” estas parto iel forŝirita el la kolosa planedo Jupitero, kaj per ĉirkaŭvojo lokiĝinta en sia aktuala orbito. Por Cherpillod ĝi estas grandega kometo, veninta el la spacego kaj definitive kaptita de nia suno, por tie fariĝi unue la brileganta „maten- kaj vesper-stelo” de tradicio kaj poste transformiĝi en la aktualan planedon Venuso. Neniu el tiuj du scenaroj estas vere pravigebla; certe ne laŭ aktualaj scioj. Cherpillod cetere mem iom konscias, ke liaj klarigoj ne „algluas” pli bone ol tiuj de Velikovski, ĉar en iu alineo li nomas ĝin neŭtrale nur „astro”.

Multaj el liaj eksplikoj pri la bibliaj eventoj, kiel la ekhalto de nia suno dum preskaŭ tuta plia tago (Joz: 13), kun akompana inversigo de la teraj polusoj (renverso de la mondo) estas detale kaj abunde eksponitaj. Sed kompreneble ne ĉiuj klarigoj povas havi saman pezon. Ekzemple lia klarigo pri la manao, kiu falis ĉiutage (escepte de sabato) el la ĉielo, por nutri la hebrean popolon, kaj tio

dum kvardek jaroj, trostreĉas la bonvolon de la leganto.

Plej kompetenta Cherpillod montras sin rilate al analizado kaj interrilatigado de la diversaj antikvaj kalendaraĵoj sistemoj. Des pli mirigas min, ke li nenie enkalkulas la ĉefan verkon de Velikovski – *Ages in Chaos* (hodiaŭ jam elkreskinta ĝis serio de ses libroj) – en kiu la eminenta scienculo firme demonstras, ke en la egipta kronologio troas 600 jaroj, pro fuŝaĵo de iu egipta pastro-kronikisto.

Impresas malagrade kaj mallojale, ke la aŭtoro ne preterlasas okazon por elkraĉi galon sur ĉio, kio rilatas al la kristana doktrino ĝenerale, kaj al la katolika eklezio speciale. Se estas vero, ke amo ofte blindigas, malamo faras tion eĉ pli. Precipe en sciencaj pritraktoj oni zorge distenu koron kaj cerbon; se ne, suferos la objektiveco.

Unu plian fojon André Cherpillod regalias nin per nekutima frandaĵo, bakita en lia tute apartstila filologia kuirejo... eĉ se li manifestas fortan emon rigardi siajn ingrediencojn nur strabe.

Manuel HALVELIK

André Cherpillod: *Kaj la suno haltis... Katastrofismo en la folkloro de la popoloj* – Eldonis la aŭtoro, 1993. Prezo ĉe FEL 270 BEF.

Estas agrable tralegi...

Kaptas la atenton la libreto de Gbeglo Koffi, kiu rakontas detale kiel li sukcesis elsalti el sia vilaĝo al ĉefurbo, estante malriĉa studanto afrika. Ne facilajn barojn li forpuŝis, speciale tiun pri manko de gepatra apogo, kaj tiun pri monseniĝo.

La knabo, kiu ŝatis naĝi en rivero kaj precipe en Lago Zowla, montris enviindan inteligenton kaj obstinan volon disvolvi sin, tial ke li superis, krom moralajn ĉagrenojn, ankaŭ korpajn suferojn. Li eltenis malsaton kaj doloron de frapoj de malica instruisto. Cetere envion kaj humiligan distingon la studanta knabo ankoraŭ spertis eĉ flanke de lernejestroj dum sia dorna travivado lernanta.

Subite tamen alvenis ŝtata subvencio, eĉ dufoje, kaj tiuj konsiderinde plibonigis lian farton.

La religia rezignacio de la togolano („Kio mi estas, tio estas laŭ la volo de Dio”), igis lin tolerema kaj pro tio la ekbatojn kaj turmentojn li elportis ne malespere.

Koffi ne pretendis verki beletraĵon,

sed bele kaj alloge raportas sian sukcesan trairadon studentan, ekde Vogano ĝis Lome, per ĝusta kaj belstila Esperanto. Kreivecon la aŭtoro sufiĉe prezentas, ĉar signifoplene vortfaradas, uzante taŭge kaj trafe la multfacetajn lingvorimedojn.

Estas agrable tralegi *De vilaĝo al ĉefurbo* kaj konstati, ke la studanto, kiu „ne elektis esti mizerulo”, plenumis precize la esperigan konsilon de Zamenhof: „... nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante ni iru la vojon celitan”.

Walter BOPPRE

Gbeglo Koffi: *De vilaĝo al ĉefurbo*. Eld.: UEA, Roterdamo, 1993. 32p. Prezo ĉe FEL: 90 BEF.

Fascina broŝuro

Pri kelkaj problemoj de interlingvistiko estas surpaperigo de intervjuo kun la franca lingvisto André Martinet. Martinet ne parolas Esperanton sed scias pri la lingvo konsiderinde pli ol la granda plimulto de la esperantistoj. Li sobre rakontas pri la avantaĝoj de Esperanto sed avertas, ke „oni nenion povas fari kontraŭ la lingvo de la mondisdonantoj”.

Fascina broŝuro. Aĉetu kaj legu! pp

Dek unu paroladetoj

Jam de multaj jaroj kelkaj esperantistoj sub la gvido de Rüdiger Eichholz kolektas terminojn por novaj nocioj (kiel ĝogi) aŭ por nocioj kies priskribo mankas en la Esperanto-vortaroj. Tiujn nociojn, kun esperantaj kaj etnolingvaj terminoj uzataj, aŭ proponitaj, ili kunmetis en 1816-paĝa verko *Plena Pekoteko 1985-1990*. La libro estas havebla ankaŭ sur disketoj IBM-kongruaj.

Pri tiu verko Eichholz verkis dek unu paroladetojn kiuj nun aperis en formo de broŝuro. Ĝi estas tre modesta laŭ formo sed interesa laŭ enhavo, almenaŭ por tiuj kiuj interesiĝas pri novaj terminoj kiel ĵurnalistoj, verkistoj, reviziantoj, ktp. Ĝi estas havebla ankaŭ kiel sonkasedoj. Prezo de la broŝuro 4 USD, de la 2 kasedoj 6 USD, afranko 2,50 USD ĉe la aŭtoro, R. Eichholz, Esperanto-Press, Bailieboro, Ontario, K0L 1B0.

Ĉiuj Esperanto-libroj estas akireblaj ĉe la libroservo de Flandra Esperanto-Ligo. Se vi estas „privilegia kliento” – tio estas, se vi havas en via FEL-konto sufiĉan bonhaston por kovri la mendon – vi ne pagos la afrankon..

Nenieslando

de Jack Wright

La seka neĝo subpiede krakas, dum Benĉjo aliras la domon de Linjo, kaj la ĉielo tre bluas.

La patrino de Linjo, por akiri iom da mono, luigas du-tri ĉambrojn. Unu el la pensionuloj, kiu ankaŭ nomiĝas Benĉjo - Linjo nomas al li Malbenĉjo - pasas Benĉjon en la strato, kaj donas al li rideton, kiu ĉiam timigas al Benĉjo.

Benĉjo atingas la domon kaj rigardas al Linjo. Plorante ŝi sidas sur benko en la antaŭa portiko. Ŝi tremas, ŝi ne portas jakon, la vizaĝo malsekas. Ŝi portas ĉirkaŭ la kolo ŝildon, kiu anoncas: „Mi estas ŝtelistino!”. Kolero parolas tra la larmoj.

„Tiu Malbenĉjo asertas, ke mi ŝtelis liajn cigaredojn. La Fipanjo akceptas tion, ne kredas al mi. Ŝi volas, ke mi sidu ĉi tie dum horo ĉiutage, ĝis mi konfesos, aŭ alia justeco fariĝos.”

La pordo malfermiĝas, la patrino de Linjo aperas, kaj admonas al Benĉjo:

„Foriru, Benĉjo. Vi ne volas asociiĝi je tia mensogplena ŝtelistino!”

Benĉjo malantaŭen piediras, kaj Linjo vokas al li, antaŭ ol la patrino silentigas ŝin.

„Poste, ni kunvenos en la kabano en Nenieslando!”

Nenieslando estas nomo donita de la gejunuloj al la regiono, kiu situas inter la urbeto ŝutloko kaj la arbarvaleteto, post kiu apude situas lageto kaj la domaro kie loĝas Linjo kaj Benĉjo. La du gejunuloj tie konstruis kabanon el forĵetita ligno, kiun ili trovis en la ŝut-



loko. Ili eĉ ekipis ĝin meble per unu sola komodo kaduka. La pordo de la kabano estis nur breĉo en la muro kun malnova lankovrilo surhoke fiksita.

Postan matenon, Benĉjo iras al la lernejo kiel kutime, sed ne povas vidi al Linjo ie ajn. El la klaso pri aritmetiko la lernantaro de Benĉjo devas alvokiĝi, por ĉeesti al kunveno de la tuta lernejo. Ĉiuj nekutime silentas, kaj Benĉjo notas, ke instruistino ploretas. La direktoro mem de la lernejo grimpas al la podio kaj malgaje rigardas la lernantaron. Ĉiuj tute kvietas, kaj la direktoro anoncas:

„Karaj lernantoj, instruistoj kaj geamikoj, mi ĉi-matenon havas por vi tre malgajan novaĵon.”

Benĉjo aŭskultas lin, timeme, dum la direktoro klarigas, ke la amikino Linjo estas mortinta. Dum la antaŭa vespero ŝi ludis sur la glacio de la najbara lageto. Bedaŭrinde, la glacio subpiede krakis, la knabino falis tra truon kaj poste leviĝis sub la tegmento de glacio. Ŝi ne povis denove trovi la truon, superglaciaj homoj ne povis trovi ŝin mem, ĝis... tro malfrue.

„Ni nur devas,” dronas la voĉo de la direktoro, „memori la vortojn de la poeto:

Skribas la fingro de Sorto, kaj, skribinte, forpasas.

Nin, kaj la plendojn kaj plorojn, ĝi senpense forlasas.

La funebra solenaĵo okazos...”

Sed Benĉjo ne plu aŭdas ion. Li senzorge ekstaras kaj grimpas sur aliaj lernantoj kaj poste kuras el la granda aŭditorio. Li kuras al la ŝtuparo suben al la necesejo por knaboj. Tiun li atingas ekoportune - li vomas kaj spasme spiras. Sed, finfine, li povas lavi la vizaĝon al si. Li rigardas sin perspegule. „Ŝi iris sub la glacio,” li diras.

Fine, li hastas el la vomejo supren al la ĉefpordo de la lernejo. Lia instruistino rigardas al li, sed ne malhelpas. Benĉjo kuras laŭ la strato.

Kiam Benĉjo atingas Nenieslandon, li longe nenion faras, krom sidi en la kabano, kaj rigardi la neĝon ekster la pordo. Fine, li ekstaras kaj moviĝas al la pordo, sed li turnas sin kaj tuŝas la komodon. Zorge, dolore, li eltiras la tirkestojn, unu post alian, ĝis ĉiu ripozas sur la grundplanko. Nur kelkaj junultrezoroj restas en la kestoj. La geo ne kolektis jam multe. Krom tirkestoj, la komodo enhavas ŝranketon kun pordeto. Benĉjo permane esploras sub la fundo. Jen pako, glubende fiksita. Zorge li apartigas, malfermas, la paketon. Jes, paketon da cigaredoj. Longe li sidas kaj rigardas la vintran lumon sur la neĝo. Fine, li eliras, alprenas iom da neĝo ĉirkaŭ la cigaredpaketon. Ŝajnas solide. Sed li malfermas ĝin kaj aldonas ŝtonon. La neĝbulo ja havas pli bonan solidecon. Benĉjo marŝas for, al la trotuaro. Finfine pasus Malbenĉjo, kies rideto ĉiam timigas al Benĉjo.

Poemoj


de Johan Hammond Rosbach

Hudiksvalo¹

Gejunuloj tipe modernaj
iras manenmane,
knabo, knabino sinakompane,
kiel de tempoj kavernaj,

levas la gambojn ritme samtakte,
iras kvazaŭ tute abstrakte.

Kun brusto ŝovita antaŭen fiere,
lin ŝi rigardas pete. espere.
Gejunuloj ja tre modernaj,
rigardoj kaj sentoj tamen eternaj.



Johan Hammond Rosbach
1990


Ateno

Okjara knabino kun robo el silko
portas enmane etan bukedon,
kiu pro l' varmo velkis ĝis pilko -
tion mi vidis pasintan vendredon.

Antaŭ palaco marŝadas soldato:
mallongan jupeton, surŝultre fusilon.
Al li la knabino pro tuja ekŝato
prezentas la florojn, la amikigilon.

La viro tamen ne flanken rigardas,
li vidas nek silkan robon nek floron,
nek scias, kiel vangetoj ekardas,
ne sentas malĝojon, ne aŭdas la ploron.

ΚΑΛΑΜΑ
ΕΞΙΝΑ
ΚΑΞΤΟΝ
ΕΞΙ - ΚΑΛΓΑΚΙ



Johan Hammond Rosbach
1993

Romo


Paŝete sur la Sacra Via,²
inter falintaj kolonoj,
iras mi kun miaj konoj
pri gloro en tempo alia.

En ĉi tiu ŝtona mondo
vivis, viglis nobla rondo
de Cezaro kaj Aŭgusto.
Sed la gloro estis krusto.

Krusto nur de agoj homaj
enpalacaj kaj endomaj:
falis temploj, falis kolonoj.
Restas nur malnovaj ŝtonoj.

1. Sveda urbeto Huddiksvall kie staras la
bronzo Modern ungdom (Modernaj geju-
nuloj) farita de P. Sondergaard.

2. Sacra via: sankta vojo.



Forum Romanum

Johan Hammond Rosbach
1992

daŭrigo

Vojaĝo al Uzbekio

de Marc Bavant

Samarkando – fabela nomo

Jerusalemo, Bagdado, Bizanco, Samarkando... Jen kelkaj sorĉaj nomoj de la fabela oriento. Pri la du unuaj ni tro multe aŭdadas, jam rompiĝis la ĉarmo. Istanbulon mi amas kaj jam dufoje vizitis. Samarkando konservis sian misteron.

Samarkando aĝas pli ol 2500 jarojn kaj nur la arkeologoj povas konstati tion. De ĝia riĉa islama mezepoko restas multaj imponaj monumentoj ankoraŭ libere viziteblaj. Multaj konservas iun ruinan aspekton, spegulantan la malfacilan klimaton kaj la oftecon de tertremoj. Mi ĝojis pro tio, ĉar tudas min viziti tro novaspektajn pretenditajn antikvaĵojn.

Tre famaj kaj tipaj estas la samarkandaj kupoloj el blue lakitaj brikoj. Ene de la konstruaĵoj svarmas ornamaĵoj el mozaiko, oro, marmoro. De la kupoloj, de la muraj anguloj kaj en la niĉoj pendas geometrie aranĝitaj alveoloj, kvazaŭ abelujaj, kiuj tre mirigis min.

Samarkando estas la ĉefurbo de la tamerlana imperio. Tamerlano, kies ĝusta nomo estis Timur Lang, vivis ĉe la fino de la dek-kvara jarcento (1336-1405). De tatara deveno, naskiĝinta iom sude de Samarkando, li konkeris landojn el suda Siberio ĝis

Anatolio, kaj estis fama pro siaj terurigaj metodoj. Oni rakontas, ke li konstruigis en Bagdado piramidon el cent mil homaj kapoj.

La plej fama samarkanda monumento estas la maŭzoleo Guri Amir, tombejo de Tamerlano, konstruigita de li por sia nepo, sed en kiun oni enterigis ankaŭ lin, kiam li du jarojn poste mortis dum batalo kontraŭ la ĉinoj.

Nemalproksime kuŝas Registan, „sablaclo” laŭetimologie, ensemblo de tri solenaj madrasaoj (islamaj altlernejoj), konstruitaj inter 1417 kaj 1660. Ĉiu madrasao okupas unu lateron de iu granda kvadrata placo. La pli antikva portas la nomon Ulug-Bek, laŭ la fama astronomo, kiu tie ĉi instruis. Laplace mem taksis Ulug-Bekon „la plej granda sciencisto de la tuta historio de astronomio”.

Proksime videblas la restaĵoj de la moskeo Bibiĥonim, nomata laŭ la preferata edzino de Tamerlano. Ŝi konstruigis ĝin por surprize donaci al sia edzo, kiam li revenos de milito. Tamen la arkitekto de la moskeo ekamis ŝin kaj minacis, ke li finkonstruos ĝin nur se li povos kisi ŝin. Ŝi tiam parable diris al li: „Jen du pentre ornamitaj ovoj. Elekstere ili estas malsimilaj sed interne ili entenas similajn ovoblankon kaj ovoflavon. Tiaj estas virinoj, eleks-

tere malsimilaj, sed interne identaj. Elektu iun ajn el miaj servistinoj kaj kisu ŝin anstataŭ min”. Sed la arkitekto respondis: „Jen du glasoj. En la unuan mi metas akvon, kaj en la duan mi metas blankan vinon. Ili aspektas tute simile, tamen la vino ĝuigas kaj varmigas al mi la koron, la akvo ne”. Devigita akcepti pro la baldaŭa reveno de sia edzo, ŝi tamen intermetis kusenon inter sia vango kaj la lipoj de la viro. Sed, la kiso estis tiel fajra, ke ĝi trabrulis la kusenon kaj restis brulsigno sur ŝia vango. Reveninte, Timur vidis la brulsignon, ekkoleris kaj paroligis la edzinon. Li volis mortigi la arkitekton. Sed tiu ĉi faris al si flugilojn kaj elflugis el la supro de la minareto.

Pli malproksime staras la ensemblo Ŝohi-Zinda „viva reĝo” laŭetimologie, nomata laŭ legendo, kiu asertas, ke iu kuzo de la profeto Mahometo, estinte tie senkapigita en la sepa jarcento, prenis sian kapon en manoj kaj malaperis en iun puton, en kiu li plu vivas (komparu kun la historio pri la katolika sanktulo Dionizio). Tiu ĉi monumento estas ensemblo de maŭzoleoj, tomboj de altranguloj kaj timuridoj.

Multaj aliaj monumentoj estas ankoraŭ en Samarkando. Ve, mia ĉesto estis tro mallonga! Estas ĉiam riske kompari la realon kun la revo, sed Samarkando, kvankam ĝi estas urbo moderna laŭ la sovetiaj normoj, konservis la povon elvoki bildojn de sia riĉa pasinteco.

Pri paco kaj solidareco

En Samarkando akceptis kaj loĝigis min Anatolo Ionesov. La juna familio Ionesov loĝas en vasta malnova rus-



La fabela
Samarkando

stila domo. Tia domo estas vidindaĵo: unuetaĝa, kun altaj plafonoj, farbitaj lignaj plankoj, imponaj altegaj hejtiloj (pro la vintra malvarmo)... ĝi rememorigis al mi la etoson de la 30aj jaroj, aŭ pli ĝuste ĝi elvokis bildojn, imagitajn dum mi legis tiuepokan sovetian literaturon, precipe la romanon de Varankin. En la domo estas elektro, gaso kaj nur unu akva krano. Dume mankas kanaletaro, sed Anatolo intencas trovi solvon al la problemo.

Profesie, Anatolo estras sian muzeon pri paco kaj solidareco (vidu MONATOn 1992/7, p. 23). Eble vi, kiel mi, neniam aŭdis pri tiaj muzeoj. Ili tamen estas kelkaj en la mondo. En ili oni konservas kaj ekspozicias ĉiajn aĵojn pri paco kaj solidareco: afiŝojn, librojn, desegnaĵojn (precipe infanajn), propagandilojn, ks. La gamo de la temoj estas sufiĉe ampleksa: paco, kontraŭmilitismo, malarmado, ekologia respondeco, solidareco kun la kripluloj, la bestoj kaj la infanoj. Pro sia ampleksa koresponda rondo, Anatolo ricevas materialon de multaj landoj, precipe de tiuj, kiel Nov-Zelando, Germanio, ktp., kie aparte viglas la porpaca kaj ekologia movado. Kompreneble, Esperanto estas menciita en multaj ekspoziciaĵoj.

Nun Anatolo kolektas materialon pri iu nova ekspozicia sekcio, dediĉita al la idealoj de paco kaj solidareco, petante la moralan subtenon de mondofamaj personoj. Tiuj ĉi, responde, sendas leteron, foton, personan subskribajon, ks. Inter ĉiuj nomoj distingebblas tiuj de la franca prezidanto Mitterrand, de Jacques Delors, de la usona senatano Kennedy, de Patrino Tereza kaj de dekoj da aliaj ne malpli famaj. Kelkaj opinioj, ke multaj el tiuj respondoj estas pli ĝentilaj ol sinceraj. Kiu povas malkonsenti pri tiaj idealoj? Eĉ Nord-Atlantika Traktat-Organizaĵo (NATO) mone subtenas la porpacan movadon. Tamen la laboro impresas. Pli grave, tiu ĉi famula aprobo pravigas la financan subtenon de la urba estraro, ĉar ĝi reklamas la nomon Samarkando en la tuta mondo.

Vizitante tiun muzeon, oni povas nur miri pri la kvalito de la laboro. Mi sincere diras, ke se la ideologia fono de kelkaj ekspoziciaĵoj restis fremda al mi (la kristanaj nocioj „amo” kaj „peko” iom tro sentebblas), tamen la ekspozicio impresis min per sia originaleco, internacieco kaj sia ĝenerala tono. Se vi iam vojaĝas al Samarkando, nepre aranĝu viziton de tiu ĉi muzeo.

Fulma ekskurso al Buĥara

Post Samarkando, Buĥara estas la plej fama turisma celo en Uzbekio. Tion ĝi ŝuldas al sia antikveco – ĝi aĝas pli ol 2000 jarojn. Se Samarkando fieras pro

la nomo de la astronomo Ulug-Bek, Buĥaran elektis la fama kuracisto Aviceno (Ibn Sina) por studi kaj por siaj unuaj heroaj kuracadoj: jam dek-sep-jara li kuracis la emiron de grava malsano.

En la pasinteco, Buĥara ofte estis la ĉefurbo de iu sendependa ŝtato. Eĉ dum la regno de Tamerlano, kvankam Samarkando estis la imperia ĉefurbo, Buĥara konservis sian religian ĉefrolon. Post la revolucio la buĥaraa emirejo fariĝis aktiva kontraŭbolŝevisma centro. Tamen, en la jaro 1920a, la „revoluciaj fortoj”, gvidataj de Miĥajl Frunze, superis ĝin kaj fondiĝis iu „Popola sovetia buĥaraa respubliko”, fariĝonta parto, kvar jarojn poste, de la nova Uzbekio. Ankoraŭ nun en Buĥara la ĉefa lingvo estas la taĝika.

Kompreneble tian faman urbon, situantan nur 250 kilometrojn for de Samarkando, mi ne povis preterpasi. Tamen la distanco estis tro granda por povi veturi tien kaj reen per buso en la sama tago kaj en Buĥara bedaŭrinde ne troviĝas esperantistoj por gastigi. Ne povinte akiri plilongigon de mia vizo, mi timis tranokti pli facile en malliberejo ol en hotelo. Do miaj Samarkandaj gastoj aranĝis taksiadon per privata aŭto. Tiun tagon ni veturis ĉirkaŭ sep horojn... La vizito plene kontentigis min.

Kiel veturi al Uzbekio?

Mi esperas, ke la antaŭaj ĉapitroj de tiu ĉi felietono instigis vin pensi pri estonta vojaĝo al Uzbekio. Se tion vi intencas, ne tro prokrastu ĝin. La politika evoluo en centra Azio estas neprognozebla, almenaŭ por mi. Tamen Uzbekio dume ŝajnas esti insulo de stabileco kaj respekto inter naciecoj. Se nur tio daŭrus!

En la nuna epoko ĉia praktika indiko pri administraciaj formalaj povas esti nur provizora. Sed la sperto instruas, ke foje la provizoro longe daŭras.

Unue elektu, ĉu vi volas uzi la servon de vojaĝorganizaĵo, aŭ ĉu vi volas organizi mem vian vojaĝon, uzante la helpon de la lokaj esperantistoj. Poste elektu iun bonan vojaĝagentejon, kiu provizos vin per la dezirata vojaĝo, aŭ peros por vi la aĉeton de flugbiletoj kaj de la eventualaj hotelaj tranoktadoj apud Inturist. Tamen, por la memstaraj vojaĝoj, ne atendu, ke tiuj homoj donu al vi multe da informoj aŭ da konsiloj. Konsideru nur, ke ili estas oportunaj por ricevi rabaton de la flugkompanio, kaj por vicumi en la ambasado anstataŭ vi. Ili kelkfoje havas reprezentanton en Moskvo, kiu povus helpi vin, se problemoj aperus.

Kelkaj agentejoj proponas relative malmultekostajn loĝejojn en Moskvo kaj Peterburgo. Temas pri privataj

loĝejoj luataj de la posedanto mem. Vi povas ankaŭ konsideri la saman servon fare de moskvaj esperantistoj.

Ĝis nun, laŭ mia kono, ne ekzistas rektaj flugoj inter ajna okcidenta ĉefurbo kaj Uzbekio. Vi devos halti en Moskvo, kaj veturi de unu flughaveno al alia. Kalkulu je almenaŭ unu horo kaj duono da veturado. La vojaĝagentejo povas aranĝi por vi tiun „transveturadon”. Laŭ mia opinio traveturi Moskvon sen viziti ĝin (ĉu en la ira, ĉu en la revena vojo) estus iom stulte.

La tempodiferenco inter Parizo kaj Moskvo estas du horoj. Ankaŭ en Rusio validas la somera tempo. La diferenco inter Moskvo kaj Taŝkento estis nur unu horo (verŝajne, en Uzbekio ne validas la somera tempo). En flughavenoj kaj stacidomoj oni ĝenerale donas la horarojn laŭ moskva tempo (eĉ por enuzbekiaj itineroj). Por busoj ne. Kiam mi aĉetis la flugbiletojn en Francio, neniu povis diri al mi laŭ kiu tempo estas donataj la horoj (nek ĉe *Aeroflot*, nek ĉe mia vojaĝagentejo!). Sciu, ke la flugo Parizo-Moskvo daŭras ĉirkaŭ tri horojn kaj duonon, kaj ke la flugo Moskvo-Taŝkento daŭras ĉirkaŭ kvar horojn.

En eks-Sovetio mem, veturi aviadile estas sufiĉe oportune sed ankaŭ multekoste ĉar vi nepre devos pagi per alilanda valuto. Veturi per trajno kaj buso estas multe pli ekonomia ĉar vi povos pagi per rubloj (ekz. Taŝkento-Samarkando, 289 km, kostas unu guldenon per trajno kaj duoble per buso). Mi supozis, ke noktaj trajnoj estas komfortaj kaj sekuraj, ĉar mi havis bonan rememoron pri iu agrabla vojaĝo inter Moskvo kaj Leningrado. En Uzbekio, tio ne validas (ne plu?). La vagonoj estas bruaj kaj malpuraj, ĉie regas neceseja odoraĉo, la akompanisto proponas nenian servon kaj, ŝajne, eĉ ne gardostaras.

Antaŭnelonge ĉie en eks-Sovetio disvolviĝis deliktiteco, ŝtelo precipe. Mi estas certa, ke ĝi ne atingis la nivelon troveblan en niaj okcidentaj urbegoj nek en la malriĉaj landoj kutime ŝatataj de la eŭropaj turistoj. Tamen estu tre singardaj, konsciante, ke se oni vin priŝtelas, ne nur vi estos en malagrabla situacio, sed ankaŭ viaj gastigantoj.

Por viaj flugoj atentu, ke vi lasas nenion valoran en viaj valizoj. Okazas, ke ili estas vizitataj. Tion mi spertis dum la revena flugo al Parizo. La maldelikatuloj verŝajne agis en la internacia flughaveno de Moskvo. Oni tamen ne emfazu tiun problemon, kiu ekzistas ĉie (eĉ en Usono laŭ lastatempa elsendo de la stacio CBS).

Por fini, mi pretas respondi viajn demandojn, doni konsilojn kaj kontaktigi vin kun uzbekiaj esperantistoj.

Bulvarde

Meze de julio, Londono spertis novan kaj multe diskutatan muzikalon, *Sunset Boulevard*, kiu estas la plej lasta infano de la finance sukcesa komponisto Andrew Lloyd Webber [Andru Lojd Ŭeber]. Inter la premiera publiko estis la renoma kino-reĝisoro Billy Wilder [Bili Ŭajlder] kiu venis por vidi kiel Sir Andrew traktis lian klasikan filmon. Tuj kiam Webber havigis al si la rajton enteatrigi la filmon, konstelacio de holivudulinoj ekstaris vice por peti la ĉefrolon de Norma Desmond, aktorino jam-ne-juna kiu frontas la finon de sia kariero – sendube rolon kiu estas samtempe alloga kaj forpela al la aktorinoj de hodiaŭ.

La historio pri la spurado post taŭga aktorino por Scarlett O'Hara en *Gone with the wind* (For kun la vento) estas jam anekdota: oni fakte jam komencis filmi antaŭ ol la angla Vivienne Leigh [Vivien Li] alvenis kaj prenis la rolon de la sudista belulino, unu el la plej konataj figuroj en la populara literaturo de Usono.

Posteulinoj de Leigh simile postulis la rolon de Norma Desmond. Sed Ann-Margret, Angela Lansbury [Āngela Lānzberi], Shirley Maclaine [Sirli Maklajn], Elaine Paige [Elajn Pejĝ] kaj Meryl Streep [Meril Strip] elreviĝis ĉar la kontraktojn por la versioj londona kaj nov-jorka ricevis Patti LuPone [Lupon], kiuj iam kantis la titolan rolon de Evita en la teatra varmejo de orienta Usono, Broadway. Glenn Close [Glen Klos] tamen povas konsoli sin per kontrakto por Los-Anĝeleso.

La preparado de *Boulevard*, kies muntado kostis tri milionojn da pundoj kaj kiu jam rikoltis kvar milionojn ĉe la ĝiĉetoj, iris neglate. Unue: kvankam la talenta Barbra Streisand [Strajsand] registris la furorkanzonon de la muzikalo, *With one look* (Per unu rigardo), ĝi ne sukcesis diske. Due: por movi la gigantajn dekoraĵojn oni devis rekonstrui la teatron – la Adelphi – kaj instali la plej modernan teknikan sistemon, kiu funkcias per radio-ondoj. La komponisto mem kaŭzis problemojn, kiam lia portebla telefono akcidente startigis la monstrajn kulisojn.

Seán OSBORNE



Patti LuPone kaj Kevin Anderson kreas la ĉefrolojn en la muzikalo *Sunset Boulevard*.

Foto: The Daily Telegraph

ĈINIO

Budhismo revigliĝas

Budhismo alvenis en Ĉinion dum la orienta Han-dinastio (25-200 p. Kr.) el la antikva Hindio, poste disvastiĝis rapide, dum kunfandado de teorioj el konfuceanismo kaj taoismo iom post iom formis diversajn sektojn kaj fariĝis landskale la grava religio, kiu grande influis la socian vivon en Ĉinio.

En 1949 fondiĝis la Ĉina Popola Respubliko; komunismo gajnis radikalan venkon en Ĉinio. Dum la periodo de Maŭ Zedong (1893-1976) preskaŭ ĉesis la agado de ĉiuj religioj; ankaŭ budhismo estis kondamnita kiel venenaĵo narkotanta la spiriton de la ĉinoj. Tial bonzoj aŭ bonzinoj, liberigitaj el „subpremado de la feŭdisma superstiĉo”, revenis en la laikan socion kun denove kreskanta hararo. Precipe dum la Kultura Revolucio la ruĝa gvardio de Maŭ kaj lia edzino Jiang Qing [Ĝjang Ĉing] detruis templojn kaj la tie kultatajn budhofigurojn.

Post la faligo de la Kvarpersona Bando (1976) en Ĉinio denove estas movado por penso-liberigo. Kun la ekonomia disvolviĝo sub aŭspicio de la politiko „reformi kaj malfermi” laŭ Deng Xiaoping [Ŝiaŭping] ankaŭ la spirita vivo de ĉinoj revigliĝas. Disĉiploj de budhismo komencis siajn agadojn, temploj estas riparataj kaj

eĉ iuj junuloj interesiĝas denove pri budhismo.

Okulfrapa konvertiĝo

Menciinda estas la kazo de fama artistino de pekina opero, Liu Changyu, kiu sur scenejo kaj kina ekrano ludis ĉefrolulinon Li Tiemei en la „revolucia moderna pekina opero” *La ruĝa lanterno*, mane tenante ruĝan signalolampon kaj emociie kantante: „Mi aŭskultas, ke avino rakontas pri la revolucio, kiom kuraĝe kaj patose...!” Iam ŝi estis la ruĝa art-batalanto de kamaradino Jian Qing, la nomita standardotenanto de l’ Kultura Revolucio. Kaj neatendite ŝi nun iris en Guajĝji-templon, Pekino, je aŭtuno de 1990. En sonorado de la „ligna fiŝo” (tintilo) kaj legomurmuro de sutro ŝi partoprenis en la budhisma rito, kiun prezidis abato Majstro Mingzhe. Post la ceremonio ŝi estis akceptita de Majstro Mingzhe kiel ties adeptino kaj laŭ budhisma regulo ricevis novan nomon: Jingyu [Ĝingju].

Budhismo nuntempe

La budhisma filozofio grande rolis en la ĉina historio. Dum la reciproka influado kun konfuceanismo kaj taoismo ĝi senhalte pliriĉiĝis; aliflanke en

konfuceanisma filozofio oni facile trovas multajn elementojn el budhismo. En la hodiaŭa Ĉinio filozofoj studadas adas budhismon. Budhismo ankaŭ penetras en familiojn de simplaj ĉinoj, moderigas iliajn animajn konfliktojn, malstreĉigas en la koroj la kordon de la klasbatalo, kiu iam stringe bridis la animon de la ĉinoj dum la periodo de Maŭ.

Ĉe pitoreskejoj kaj vizitindejoj por turistoj ĉie tra Ĉinio oni povas trovi budhanajn templojn, en kiuj troviĝas bonzoj junaj. Ili, forigante laikan mondon, vivas apud blua lampofajro kaj volumoj de sutroj. Tamen en temploj oni ankaŭ vidas spurojn de la modernigoj: elektra lampo anstataŭas olean lampon, eĉ telefono surgrimpas montsupren, enirante abatan ĉambron. Eble tiuj bonzoj deziras animan trankvilecon en budhisma kariero.

Shi CHENTAI

Iom pri Liu Changyu

Liu Changyu studis la arton de Pekina Opero ekde 1951. Post diplomiĝo en Ĉina Teatra Instituto ŝi gajnis grandan sukceson sur scenejo, fariĝis fama aktoro. Dum la Kultura Revolucio, kiel dirite, ŝi ĉefrolis en *La ruĝa lanterno*. Kiam pro malatento ŝi iam ŝokis kamaradinon Jiang Qing, ŝi estis kondamnita. Post la fino de l’ Kultura Revolucio ŝi estis reestablita; ŝia artvivo havis duan junaecon kaj gajnis por ŝi eĉ pli grandan renomon. Diversaj honoroj atingis ŝin unu post alia: ŝi estis elektita membro de Ĉina Politika Interkonsiliĝa Konferenco dufoje, membro de la plenumkomitato de Ĉina Tutlanda Junulara Federacio, komitatano de Asocio de Ĉinaj Teatristoj... ĉio ĉi dum la lastaj dek jaroj.

Tamen ofte ŝi sentis sin obsedita en homaj rilatoj, ne kapablis mem harmonii kun sia ĉirkaŭo kaj medio. Tial ŝi sin turnis al budhismaj sutroj, en kiuj ŝi deziris serĉi spiritan emancipiĝon. Fine, sub gvido de intima amikino, ŝi eniris trans la budhanan pordon. Tamen ŝi ne tute atingas la plej altan gradon de budhismo: nirvanon. Ŝi restas en la reala socia vivo. En pasintjara vintro (1992) ŝi partoprenis en la granda konkurso de Pekina Opero, nomata mei Lanfang, la fama majstro de Pekina Opero.



La „Granda Budho” en Kamakura, de la 12a ĝis la 14a jarcento la plej grava religia, artista kaj kultura centro de Japanio. La bronzan bildon gisis Ono Gorumon, unu el la plej grandaj skulptistoj de sia epoko.

Konata E-organizaĵo reorganizis sian eksmodan telefon-sistemon kaj hazarde registris unu flankon de konversacio. Jen ĝi. La redakcio de MONATO aldonis iom da akuzativoj por ne ofendi la okulojn. Ni ne tuŝis la neologismojn, tamen ŝanĝis plurajn nomojn por protekti la ĉarman akceptistinon.

„Ha lo-ho...”

Bonan posttagmezon jen Fl*ndra Esperanto Ligo Greta parolas ĉu mi povas helpi vin?

Ho, Chantal, estas vi...

Jes, jes, hieraŭ nokte! Kaj kia sinjoro! Kion? Fakte, ne, ne dum la unua rendevuo. Neniam. Almenaŭ – nu, eble, sed lia fratino faras ion imponan en la urbodomo, laŭ mia scio...

Jes, ni iris al ia festo organizita de la patrino-klubo malantaŭ nia loka preĝejo. Kion? Ne, malantaŭ...

Jes, *treege* populara. Li infuzis la teon, kaj kompreneble tio tute tute mal-simpatigis s-inon Nolte...

Jes, kiel kutime. Kaj ŝi pensas ke ŝi estas komika. Ŝi estas komika. Preskaŭ tiel komika kiel brulanta hospitalo. Tamen ŝi jes rakontis al mi tre bonan ŝercon. Aŭskultu. Kio estas peza, ronda, verda, kaj nevidebla? Vi ne scias? Nu, ĉi tiu brasiko...

Ĉi tiu brasiko...

Aŭskultu, ĉi tiu brasiko...

Ne! Mi tenas la manon kvazaŭ mi havas brasikon. He? Ne, kara, mi ne havas brasikon, mi ŝajnigas...

Jes, jes, mi cedas, estas vida ŝerco. Sed kion mi ĵus diris? Ho jes, pri li. Kion? Ne, mi jam diris, neniam dum la unua rendevuo. En ĉiu kazo, kara, Dio verŝajne konceptis lin por libido, ne por rapido...

Jes, multajn. Mi jam diris, li estas vera sinjoro. Kaj ankaŭ bileton por la loterio...

Ne, mi mem neniam aĉetas biletojn por tiu loterio. Kial? Mi jam diris al vi...

Jes, kara, mi jam diris...

Kaj certe ne kiam s-ino Nolte organizas ĝin – estis klaĉo en la tuta paroĥo...

Kompreneble vi jam aŭdis tion...

Jes, vi jam aŭdis ĝin. Aŭskultu. Ĉiu kiu gajnas premion en tiu loterio estas familiano de ŝi...

Jes, familiano. Aŭ estonta familiano... Ho jes, mi scias, kiel kunikloj. Ba! Fi! Aĉ! Kion? La loterio? Jes, krozo al Trinidado...

Ne, Tri-ni-da-do. Eksterlanden...

Ne, stulta, ĝi ne estas verba substantivo...

Kun revenbileto, mi supozas, sed mi rifuzas krozi tien. Kial? Mi ne scias. Tiuj stevaroj, oni aŭdas tiom da onidiroj. Mi tute ne povas toleri elreviĝon. Sed kion mi ĵus diris? Ho jes, pri li. Kion? Ne, ne entute. Li loĝas ĉe la patro de sia eksbofrato, ĉu vi sciistion?...

Sufiĉe simpatia, jes, la postan dimanĉon – ĉu la postan dimanĉon? – jes, la postan dimanĉon. Kion? Ho, jes, *tre* afabla. Almenaŭ, riĉa: estas la sama afero, ĉu ne? Vera sinjoro, fakte. Sed senila kiel krokodilo. Domaĝe... Ne, ĉu? Telefone? Cc! Cc! Fakte, mia avino ricevis sep-ok obscenajn telefonaĵojn dum la sesdekaj jaroj...

Ne, tute ne. Ŝi forigigis sian nomon el la telefonlibro, nun ŝi ricevas nur elitajn obscenaĵojn. Kion? Jes, *tre* bone. Senila kiel krokodilo, tamen. Ŝi ĵus aĉetis libron kun krucvortenigoj – pardonu, mi vere devas ridi – se ŝi trovas vorton kiu estas tro longa, ŝi simple skribas pli malgrande...

Ne, ne *tute* surda, sed mi devas diri *ĉion* dufoje. Aŭ mia sincereco elĉerpigis, aŭ mi devos aĉeti papagori. Kion vi diris? Aŭdaparaton? *Give me a break!* Mia kuzo Kirk, ekzemple, estas tiel surda kiel via ŝuo, sed li aĉetis aŭdaparaton, kaj nun li povas aŭdi se pasero – se pasero singultas en Maastricht. Sed kion mi ĵus diris? Ho jes, pri ŝi. La kompatinda, ŝia sanstato estas iomete ita-ata. Si havas platan femuron, elektran koron, kaj unu el ŝiaj pulmoj estas – mi forĝas, ie en Utreĥto. Sed kion mi volis diri al vi? Ho jes, pri li. He? Jes, jam estas lia tria jaro en la universitato...

Mi ne scias, ion pri minoritatoj en Hispanio. Vaskektomio, aŭ io simila...

Kun kiu??? Tiu stratangululino? Vi ne diris tion al mi antaŭe...

Ne, vi ne diris. Mi bone memoras ke vi *ne* diris...

Nnnnnnjes, kvar edzojn, ne kalkulante alies...

Jes, mi certas, kvar. Ŝi edziniĝas tiel ofte, ŝi ricevas rabaton ĉe la florbutikoj. Kaj laŭ mia scio, ŝi ĉiam portas grandajn puloverojn...

Jes, *tre* belaj, sed dum ĉi tiu varma vetero? Kion? Jes, prave, pasintan semajnon, kun pretektso ke ŝi volas kopii recepton por gingiva biero de mia patrino. Sed laŭ mi ŝi ekvidis mian fraton en la ĝardeno. Li enterigis ion sen ĉemizo. Vi scias kia ŝi estas. Mi volonte dirus al ŝi la veron pri unu-du aferoj, sed mi ĉiam estas fakte *tro* pardonema. Kiu? Ŝia patrino? Ho jes,

kia simpatia virino. Sed ŝia edzo, li estas – nu, mi ne rajtas salkri en la oficejo se estas vizitantoj. Kiu? Marjorie Boulton, aŭ Georgo Kamaĉo, mi ne certas, la limuzino havis nigrajn fenestrojn...

Jes, jes, ankaŭ mi! Hmm, dieca – kiel du persikoj en velura sako. Kiu? Ho, li, li eliris antaŭ duonhoron, nur kvin minutojn, li diris...

Jes, tion li diris al mi dimanĉe, do ne pre estas almenaŭ plejparte vera...

Ne, por la Nov-Jorka oficejo. Imagu, statuo de Humphrey Tonkin. Kiel? Simpla afero, mi kredas. Prenu iom da marmoro, kaj forĉizu la partojn kiuj ne aspektas usonaj. Sed kion mi ĵus diris? Ho jes, pri ŝi, ŝia patrino, povrulinino, ŝi estas pajla vidvino...

Pajla...

Ne, *pajla*, kion vi celas, *ajlo*? Mi ne scias kial ŝi elektis tian vulgaraĉan ulon. Li agacas al mi la ventrojn, mi diras al vi senkaŝe...

Nnnnnnjes, kaj poste psiĥanalizon. Laŭ mi, persono kiu pagas tiom da mono por psiĥanalizo *nepre* estas freneza. Tamen mi povas kompreni lian sintenon. He, ĉu vi ne aŭdis? Oni rompis la fenestron de lia kroma ĉambro...

Jes, la fuŝita, aŭskultu, dum li forestis, en la kinejo, kaj – pardonu, mi vere devas ridi – estis lia kvara vizito al *Dancing with wolves*...

Ne, ili ŝtelis absolute nenion, sed ili postlasis iom da moneroj sur la tablo en la kuirejo...

Ne, fakte, ne estas *tro* da sekso en filmoj, nur *tro ofte*. Kaj tiu aktorino, kiel ŝi nomiĝas? Ŝi estis en la televido hieraŭ, vi certe vidis ĝin, tiu bonega reklamo pri – pri io, nu, ĉu vi vidis ŝin? Ŝi montris la mamojn preskaŭ ĝis la pintoj, kaj *tiom* de la femuroj – nu, havus la saman efikon porti nur zonon anstataŭ jupon. Ba! Fi! Aĉ! Sed kion mi ĵus diris? Ho jes, pri...

Justa ĉielo, kioma horo? Mi ankoraŭ ne lunĉis, kaj mi deĵoros koktele je la tria. Kion? Kara mia, mi tute ne scias kial vi telefonis min. Mi devas eliri kvin minutojn, do retelefonu post la dua. Se vi memoras kion vi volis. Ĝis la-ha!"

Idiotino!

Seán OSBORNE

Viajn kontribuojn por la rubriko „humuro” sendu al:

Seán Osborne
Hengelveldebrink 276
NL-7544 TW Enschede
Nederlando

anoncetoj

En mia kolekto mankas la jenaj numeroj de MONATO: 1988/2 (la vera de februaro) kaj 1991/10. Kiu povas havigi ilin? Faru proponon: W. de Smet, Hertendreef 12, B-2920 Kalmthout, Belgio.

Jaŭto veturas for... de Deck Dorval, estas unu el la plej streĉaj krimromanoj en Esperanto, ofte komparita kun „Dek etaj nigruletoj” de Agatha Christie. Prezo 360 BEF (ĉ. 19 guldenoj). Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. Se vi havas konton ĉe FEL kun minimuma bonhavo de 360 BEF, vi ne pagas la afrankon!

Kolektantino de naskiĝkarto ŝatus ricevi ekzemplerojn diverslingvajn el pluraj landoj. Bonvolu skribi al s-ino Francine Vanden Daele, R. Rinskopflaan 20, B-9050 Gentbrugge, Belgio.

Por la alsendo de **uzita karto** por aŭtomata pago de telefonalkvoto mi interŝanĝas kun poŝtfreŝa poŝtmarko kun Esperanto-temo. Mi volas pruvi, ke per Esperanto mi povas pli sukcese kolekti internaciskale. R. Verbeke, Vredestraat 66, B-8310 Brugge, Belgio.

5an decembro F.E.T. Zamenhof-Festo. Bonvolu sendi salutkartojn. Ni respondos. Gérard Réquigny, Travailleur Espérantiste Cité Franc Moisin, Bât.3, Esc.10, F-93200 Saint Denis, Francio.

Docento pri juro en la universitato de Loveno ŝatus korespondi pri interesaj temoj. Skribu al Prof. Dr., L. Lamino, College De Valk, Tiensestraat 41, B-3000 Leuven, Belgio.

Malprudente elspezi aŭ malkomforte tranokti? Se vi preferas la duan, petu la informilon de Gastejo Verda Lumo, 228 Capworth Street, London, GB E10 7HL, taŭga por turismi, por komerci, por festi aŭ por anonimi.

Internacie kuiri estas kuirlibro belaspekta kun receptoj el la tuta mondo. Ideala donaco por al festotagoj! Prezo 570 BEF (ĉ. 30 guldenoj). Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. Se vi havas konton ĉe FEL kun kredito de minimume 570 BEF, vi ne pagas la afrankon!

20jara fraŭlo deziras korespondi kun 20-24-jaraĝaj esperantistoj en la tuta mondo pri ĉiuj temoj. Skribu al s-ro Co noir Sébastien, 23 rue Carnot, F-95160 Montmorency, Francio.

Belaspektaj koloraj kartoj kun floroj kun la mencio „Ĝojigan Kristnaskon, feliĉan Novjaron!” haveblaj de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Prezo por 10 ekz., inkl. 10 kovertojn kaj afrankon: 450 BEF (ĉ. 23 guldenoj).

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 40 belgaj frankoj* (BEF) por unu linio (minimume 240 BEF*). Sama anonceto kvinfoje: triobla tarifo. Antaŭpago necesa. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

*Por Eŭropa Komunumo + 19,5 % AVI.

Flandra Esperanto-Ligo

havas 3817 klientojn...

1277 inter ili estas

privilegiaj klientoj.

Tiuj privilegiaj klientoj

- ne pagas afrankon kiam ili mendas Esperanto-librojn;
- ne pagas afrankon kiam ili mendas Esperanto-diskojn, kasedojn, ktp.
- kaj estas regule informitaj pri specialaj malmultekostaj ofertoj.
- Por ili FEL aŭtomate kaj sen administraj kostoj ĉiujare renovigas la abonojn de diversaj revuoj, la kotizojn de fakasocioj, ktp.
- Laste, sed ne balaste, ili povas senkoste ĝiri sumojn al UEA-kontoj kaj al FEL-kontoj kaj akcepti sumojn de aliaj pagantoj.

Kiel iĝi privilegia kliento?


Simple ĝiru rondan sumon al unu el la kontoj de FEL. La rondo sumo kovru la mendojn kiujn vi intencas fari.

Ekzemple: vi mezume aĉetas por 2000,- BEF da libroj kaj revuoj jare. Pagu do al via FEL-konto 2000,- BEF. Vi regule ricevos konteltiron kaj do scios kiam la 2000,- BEF estos foruzitaj kaj kiam estos tempo por denove „plenigi” vian konton. La bonhavo prefere restu pli ol 1000,- BEF.

La *ideala donaco* por viaj korespondamikoj

La donaca karto de FEL

Mendu ĉe FEL unu aŭ plurajn kartojn. La valoron de la kartoj vi mem fiksas. Sendu la kartojn al viaj amikoj, okaze de la festotagoj. Ili povas interŝanĝi la karton kontraŭ libroj, abonoj, filatelaĵoj, k.t.p.



„Stafeto”-serio prezentas

Kanto pri Minotaŭro

kaj aliaj poemoj

Gerrit Berveling

„Oni aŭdas la melodiojn de la vergiliaj heksametroj, la horaciaj kvarversoj, la sapfaj strofoj... Kiel verkisto vere esperanta, ne nur mense tradukanta, li bele ekspluatas la apartajn kvalitojn, rimedojn, grandajn permesojn de nia lingvo” (el la enkonduko de Marjorie Boulton).

„Kanto pri Minotaŭro kaj aliaj poemoj” estas akirebla ĉe ĉiuj bonaj libroservoj kaj ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Prezo ĉe FEL: 450 BEF.

Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio

Jen la fak-asocio por vi, se vi

- verkas nacilingvajn artikolojn pri la Esperanto-movado, aŭ intencas fari tion;
- havas aŭ ricevos la taskon de informado kaj publikaj rilatoj de via asocio aŭ klubo;
- organizas Esperanto-kongreson, aŭ intencas fari tion;
- verkas por E-gazetoj, aŭ intencas fari tion;
- redaktas aŭ eldonas E-revuon, aŭ intencas fari tion;
- volas fariĝi ĵurnalisto.

Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio (TEĴA) multmaniere povas helpi kaj servi al vi. Kiel, tion vi detale ekscias per inform-kajereto TEĴA PREZENTAS SIN. Petu ĝin de l' prezidanto

S. Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio

Se vi ne volas membriĝi, tamen legi nian fakrevuon *Internacia Ĵurnalisto*, simple abonu ĝin rekte ĉe Flandra Esperanto-Ligo.

Jara abonkotizo por 4 numeroj kun 16 paĝoj en formato DIN A 4: 30 germanaj markoj aŭ egalvaloro (ekz. 21 USD).

Tiuj ĉi kaj multaj aliaj belaspektaj brakhorloĝoj estas haveblaj ĉe FEL aŭ rekte ĉe la importisto, Flory Witdoeckt, Witte Nonnenstraat 9A, B-8400 Oostende. Prezo de la dekstra horloĝo 1087 BEF, de la maldekstra 1182 BEF (ambaŭ inkluzive imposton sed ekskluzive afrankon).

Esperantisto ? Certe ! Kristano ? Eble.
Ĵiam

DIA REGNO

estas **VIA** revuo.

Mendu provekzempleron ĉe Leen Hordijk,
van Hogendorpstraat 4, NL-3135 CD Vlaardingen, Nederlando.

SENNACIULO

Organo de


Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT)

kies membroj kontribuas al kreo de mondo emancipita, tolerema, sen-antaŭjuĝa.

Aperas monate.

Petu informojn de:

SAT, 67 av. Gambetta,
F-75020 Paris, Francio.



"Stafeto"-serio prezentas

Vojaĝoj

kaj aliaj poemoj


Edwin de Kock

Poezie turismi en Eŭropo, ĉu antikva, ĉu nova. Festi la centjarigon de Esperanto. Ĝue pripensi dum momento da silento... Jen la eblecoj, kiam vi legos la poemaron de nia sud-afrika poeto.

Ne timu... Notoj kaj vortlisto helpas vin tra malfacilaj partoj. La poeton mem vi povas ekkoni legante liajn biografiajn notojn. Tiu ĉi poemaro vere malfermas poezion al ĉiuj. Modele!

Vojaĝoj kaj aliaj poemoj. 148 p., 390 BEC + sendokostoj, bindita. Mendu ĉe via kutima libroservo aŭ rekte ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

LA GAZETO



mondkultura
sendependa
esperantisma

PETU PROVNUMERON ĈE:
LA GAZETO
55210 CREUE, FRANCO

Se vi estas malkontenta pri
MONATO
diru tion al ni!

Se vi estas kontenta pri
MONATO
diru tion al aliaj!

MONATO ankoraŭ serĉas

ANONCVARBANTOJN

Se vi kapablas varbi anoncojn ĉe firmaoj, anoncu vin ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

La laboro estas pagata!

Varbi por **MONATO** estas tre simpla afero:
Uzu nian koloran

FALDPROSPEKTON!

Petu la bezonatan kvanton ĉe
MONATO, Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, Belgio.